

PACO

OFICIALA ORGANO DE MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO

N-o. 29-30

ĈEĤOSLOVAKIO

Aprilo-majo 1956

BATALO ĈIRKAŬ LAŬROJ

Multaj kapoj nun turmentiĝas kun la problemo, kiu havas la meriton pri la renaskiĝo de la Esperanto-movado en la Popoldemokratioj kaj Sovjet-Unio. Ĉiuj klopodas atribui al si la meriton kaj se tion ne sufiĉe bone eblas, do ili almenaŭ klopodas atribui ĝin al la pli favorigitaj cirkonstancoj, UNESCO ktp.

Praktike ne havas tro altan signifon diskuti pri tiu problemo, sed por la historio de Esperanto tamen valoras trovi la veron. Laŭ mia opinio estus plej simple, demandi la sovjetajn kaj popoldemokratiajn esperantistojn mem, kiu ĉe ili iniciatis la renovigon kaj reaktiviĝon de nia movado kaj oni ricevus la plej ĝustan respondon.

Nia redakcio, rilate tiun aferon, jam ricevis multajn kontribuadojn, sed ni intence ne publikis ilin. Nun, kiam la „batalo ĉirkaŭ la laŭroj“ ĉiam pli kaj pli vastiĝas, ni tamen volas sin okupi iom per tiu afero. Ekzemple, en n-o.5 de 16. estis en „Heroldo de Esperanto“ publikigita jena artikolo:

PRI LA REVIVIĜO DE ESPERANTO EN SOVETIO

Oni petis nin el lando transkurtena publikigi jenon:

Estos utile nun, dum freŝa memoro, kiam ni staras en centro de la okazintaĵoj, klare noti, ke la evidente ŝanĝitan sintencon de sovetuniaj aŭtoritatoj neniel kaŭzis iu esperantista influo el alia lando. Kiam montriĝis en USSR ebleco eklabori tie denove por Esperanto, la sovetuniaj esperantistoj ne estis informitaj pri Esperanto-movado en la cetera mondo, ili sciis nenion pri ekzisto de „Pacdefendanto“.

Unua Esperanto-vivsigno el Sovetunio estis letero, kiun direktis la rusa sciencisto Bokarev al Bulgario. Tio estis signalo por esperantistoj el multaj landoj, ke ili superŝutu nian rusan amikon por informoj pri la nuntempa stato.

Tiujn ĉi faktojn ni devas memori, por ke ne estu falsita la historio de Esperanto kaj por ke ne ekestu senbazaj supozoj, kiuj ŝanĝiĝas en ne ĝustajn asertojn. Same kiel aperis sia-tempe ne motivitaj klaĉoj (eĉ kun cito de nomoj), kiuj volis klarigi la subitan ĉeson de la Esperanto-movado en USSR.

Restas la fakto, ke Esperanto vekiĝas en Sovetunio el multjara dormo, kaj ni kuraĝas aldoni, ke ĉio aspektas tiel, kvazaŭ la UNESCO-decido en Montevideo ludis en la afero sian rolon. Tamen eĉ pri tio necesas havi antaŭe fidindan konfirmon.

Efektive, povas esti utile, anticipi eviti falsan impreson. Aliflanke, kvankam konsentante ne kun ĉio enhavita en „La Pacdefendanto“, ni opinias, ke tiu revuo faris kaj faras atentindan laboron por nia afero en la specialaj cirkostancoj en kiuj ĝi troviĝas. – Red. (de HdeE).

Nu bone, - sed kial tiu „oni el lando transkurtena ne subskribis sian artikolon? Se mi estas tiom certa pri mia aserto, tiam mi povas kuraĝe subskribi per propra nomo!

Mi opinias, ke tiu „onidirulo“ tre verŝajne loĝas en Ĉeĥoslovakio kaj kalkulas sin en la vivojn de tiuj, kiuj ne favoras la Pacdefendanton, en la kredo, ke eblus iri laŭ la malnova vojo, se ne „LP“ jam starus sur vojo plifavora. Tio tamen estus granda eraro.

Inter la multaj artikoloj kaj leteroj rilatintaj tiun aferon, mi citas artikolon, kiun havigis al nia redakcio k-do.P.Balkányi el Budapeŝto. Jen legu:

„Ni ne scias, kial estas grava laŭ „historia vidpunkto“, kiel oni diras en artikolo aperinta en „Heroldo“, kiamaniere rekomenciĝis la movado en Sovjetunio, sed por esti preciza, ni devas rimarki jenon:

Kun sovjetaj k-doj -certe ne sole- jam de j.1952 korespondis P.Balkányi el Budapeŝto. En 1954 el Budapeŝto. En 1954 li skribis al prof.Bokarev en Moskvon (kiun mencias la artikoleto en „Heroldo“) kaj tiu respondis al li en decembro 1954. Io multe pli frue ol kiam li sendis leteron al Bulgario! (tiutempe k-do.Balkányi jam korespondis kun k-doj.el Moskvo, Erevan kaj Kujbiŝev).

La unuan gravan leteron de profesoro Bokarev aperigis tiutempe „La Pacdefendanto: en 1955, do pli frue ol venis letero al Bulgario. „Pacdefendanto“ eĉ plendis, ke k-do. Balkányi tiam ankoraŭ ne konigis la nomon de la skribinto el Moskvo!

Prof.Bokarev mem skribis la 29 de majo 1955 al k-do. Balkányi:

„Vi ĝis nun estis mia sola eksterlanda korespondanto.“

Kaj li ree skribis la 26.de junio 1955:

„Mi povas atesti, ke vi estis la unua, kiu instigis min al esperanto-aktiveco!“

Tiutempe k-do. Balkányi konigis la adresojn de siaj sovjetaj korespondantoj al „La Pacdefendanto“ kaj al aliaj revuoj. „L.P.“ publikigis ilin kies sekvo estis, ke la sovjetaj gek-doj ricevis abundan korespondaĵon el multaj landoj eĉ jam ne sufiĉis respondi al ĉiuj. Tiamaniere ili - ankaŭ k-do. Bokarev – eksciis pri la stato de la Esp-movado. Li plej unue ricevis detalojn de k-do. Balkányi, la „Pacdefendanton“ kaj „Pacon“ kaj eksciinto la adreson de la bulgara movado, li skribis tien.“

Se por la historio estas grava, jen dokumente la kronologia sinsekvo de la korespondado!

Laŭ la opinio de k-do.Balkányi povas esti, ke ankaŭ UNESCO donis bazon por revigligo de nia movado en Sovjet-Unio. Tion cetere necesus esplori rekte ĉe la tieaj esperantistoj.

Kelkfoje mi jam anoncis, ke eblas mendi kompletan jarkolekton ĉe la red.de „La Pacdefendanto“ el la jaro 1955 kontraŭ pago de 12.-Kĉs aŭ 16 int.resp.kuponoj. En tiu ĉi jarkolekto klare respeguligas la historia evoluo de la Esp-pacmovado en la Popoldemkroratioj kaj Sovjet-Unio.

Necesas ankaŭ noti, ke k-do.P.Balkányi, same kiel la redaktoro de „L.P.“ estas aktivaj funkciuloj de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), sub kies devizo “Per Esperanto por la mondopaco!” ili laboras.

Estas fakto, ke la unua esper.gazeto, kiun ricevis popoldemokrataj kaj sovjetaj esperantistoj, estis „La Pacdefendanto“ kaj „Paco“. La Pacdefendanto“ estas ankoraŭ nun en centoj da ekzempleroj liverata al Sovjetio kaj popoldem.landoj. Se oni atente legas „Pacon“, eblas facile konstati, ke la unuaj perantoj de la E-pacmovado estis publikigitaj sur ties listo kaj nenie alie. En la jaro 1951 eksilentigis sinsekve la Esperanto-asocioj el ĉiuj popoldemokrataj landoj, en Sovjetio jam pli frue kaj en ĉinio pli malfrue. La unua n-o.de „La Pacdefendanto“ aperis en januaro 1952 tuj post la memlikvido de la Esp.Asocio en ĈSR. Ĝi aliĝis al la devizo de niaj ĉinaj gek-doj „Per Esperanto por la mondopaco!“ Tiam ni istingis fondi Esp-rondetojn en la kadro de klerigaj, kulturaj kaj uzinaj kluboj, kie la esperantistoj per aktiva kunlaborklopodu akiri ties simpation kaj apogon. En tiu direkto ni ankaŭ sukcesis.

Ni siatempe konsciis, ke eblas krei izolitan „insulon“ en maro de Popoldemokratioj, en kiuj Esperanto ne vivas. Sekve ni klopodis unuavico revivigi laŭ sama maniero nian movadon en ĉiuj popoldem.landoj. Tion povas atesti k-do.B.A.VELEV kaj prof.C.Murgin en Bulgario, k-do.Pál Balkányi, d-ro.J.Kondor kaj Márton Lajos el Hungario, k-do ing.Glajcar el Polio, k-do.Vrinceanu Pohl kaj Czapo el Rumanio, k-do. N.V.Kinh el Vietnamo kaj aliaj, kun kiuj nia redakcio en tiu afero rilatis, ilin instruis kaj al aktiveco instigis.

Sed en tiu laboro ni ankaŭ renkontiĝis kun grandaj malhelpoj. La ĉefa malhelpo estis, ke nia oficialaj instancoj rifuzis nian propagandon kun la preteksto, ke en Sovjet-Unio Esperanto ne ekzistas. Sekve de tio, por plifaciligi nian agadon en la Popoldemokratioj, necesis revivigi Esperanton en Sovjetio. Pri tio jam antaŭ ni klopodis kelkaj organizoj, inter kiuj ni citu „SAT sed iliaj nelertaj leteroj, tiam direktitaj al k-do Stalin ne atingis pozitivan rezulton. La sovjetaj gek-doj bezonis havi argumenton, ke Esperanto jam praktike uzas en amikaj popoldemokrataj landoj kaj alie, por servi al la sekurigo kaj defendo de la mondpaco. Tiun argumenton ni sukcesis doni al niaj sovjetaj gek-doj.

Baldaŭ migros el Ĉeĥoslovakio granda ekspozicio de esperantista pacpropaganda materialo al Leningrado por la Esperanto rondo de la plej granda leningrada kulturdomo. Kaj ni donacas tiun ekspozicion, por ke ĝi migru tra ĉiuj respublikoj de la granda Sovjet-Unio kaj helpu al niaj gek-doj en iliaj klopodoj por nia komuna afero. Laŭ niaj direktivoj, t.e. direktivoj de „*La Pacdefendanto*“ kaj de „*MEM*“ la sovjetaj gek-doj al ni konataj, unuavice kolektis ĉiuj adresojn de sovjetaj esperantistoj kaj ligis kun tiuj kontakton kun la celo revigligi la movadon, repektive, fondi Esperantistan Pacmovadon en Sovjet-Unio. Por propagandi tion, ili uzas ankaŭ nacilingvan gazetaron. Inter aliaj tre favorajn artikolojn publikigis la erevana armenlingva pedagogia gazeto kaj „Padomju Skolotajs“, instruista gazeto en Riga. Esperantistaj Pacrondoj jam fondiĝis en kelkaj urboj kaj respublikoj, oficiale kaj ne oficiale. Alie niaj gek-doj kunvenas provizore en privataj loĝejoj atendante konsenton por fondi organizon.

Ne eblas ĉi tie citi ĉiujn ĝis nun atingitajn sukcesojn. Fakto estas, ke la movado en Sovjetunio jam reaktiviĝas kaj tre rapide kreskas. Sur mia redakcia tablo kuŝas jam centoj da leteroj kun pli aŭ malpli gravaj raportoj el diversaj respublikoj de Sovjet-Unio. Baldaŭ niaj gek-doj ricevos el Sovjetio la unuan numeron de „PACO“ kaj propra revuo jam estas en preparo. Ĝi unue estos ruslingva por propagandaj celoj. Ni esperas ricevi sufiĉan kvanton por niaj popoldem.gek-doj. al kiuj ĝi multe helpos en ilia propagando.

Ke ni fakte estis la unuaj, kiuj instruis, instigis kaj kuraĝigis la sovjetajn gek-dojn, tio evidentiĝas el niaj raportoj kaj informiteco. Kiu tamen ne kredas, povas demandi ĉe k-doj. Bokarev, Pisarev, Sariĉev, Vietra, Arbergs, Mozerts, Mkrtiĉjan, Sevak, Kiselev, Popov, Podkaminer, Cvetkova, Munak, kiuj estas la unuaj kuraĝaj pioniroj de la Esperantista Pacmovado en la granda Sovjet-Unio. Iliaj raportoj kaj leteroj plejparte estis jam publikigitaj en nia cirkulero, kaj ili ankaŭ povas atesti miajn asertojn.

Nun ni klopodas vekti Ĉinion. Ni esperas, ke kun tiaj argumentoj en la manoj, ni facile sukcesos. Tiam ni povos ankaŭ en tiu direkto prezenti al la tutmonda esperantistaro la fakton, ke Esperanto en la servo de la mondpaco nepre iras renkonten al la venko.

R.BURDA

VERDUN ADMONAS AL MALARMIGO

Impona manifesto okazigis sur la plej giganta batalkampo de la unua mondmilito en Verdun.

Pli ol 3.000 delegitoj el tuta Francio kaj multaj eksterlandaj gastoj kunvenis ĉi tie por rememorigi la 40jaran datrevenon de la plej kruela, vitkomojn postulinta batalo de la unua mondmilito. En la tombejo Douaumont, proksime ĉe la urbo, okazigis solena ceremonio por paco kaj malarmigo. Poste sekvis granda demonstrado de la urbo. Generalo Petit, la prezidanto de la franca pacmovado en sia parolado rememorigis, ke la bataloj ĉe Verdun postulis 1.5 milionojn da mortintoj kaj vunditoj, francajn kaj germanajn. Li proklamis, ke oni perfidus la heroojn de Verdun, se oni ne batalus por la paco, malarmigo kaj kunlaboro inter la popoloj.

Krom la gastoj el Polio, Ĉeĥoslovakio, Anglio kaj Belgio parolis ankaŭ reprezentanto de okcid. germana pacmovado kaj kondamnis la tien rearmigadon. Unuanime estis akceptia rezolucio, akcentanta la absolutan eblecon de ĝenerala interkonsento rilate la armil-malmultigen. En ĝi oni postulas malperson de atom-armiloj.

Tuteŭropa armil-malpliigo kaj kolektiva sekureco ebligus krome ankaŭ pacan solvon de la germana problemo.

El „NEUES DEUTSCHLAND“ tradukis: Rudolf Müller, Dresden

Tragika Rememoro

Pasis 40 jaroj post kiam furizis unu el la plej sangaj kaj longdaŭraj bataloj en la mondhistorio – la batalo pri Verdun.

La batalego komenciĝis per germana atako la 21. de febr. 1916 kaj daŭris ĝis la 18a decembro. 27 germanaj divizioj kaj 30 francaj interbatalis. Ambaŭ partioj havis preskaŭ same grandajn perdojn. Komune ili perdis ĉirkaŭ 1 milionon da soldatoj.

La franca verkisto Jules Romain partoprenis kiel juna leŭtenanto la enkondukan fazon de tiu batalego. Li vivece priskribis ĝin en sia aŭtobiografia *romanserio* „La homoj de bona volo“. Per skuantaj bildoj li montris kiel la germana bombardado disŝiris ĉion, detruis tranĉeojn kaj mortigis preskaŭ ĉiujn en ili.

La germana generalstabo ne sukcesis efektiviĝi sian militcelon. Kaj la Verdun-batalo estis decidiga por la rezulto de la unua mondmilito.

Tiel okazis antaŭ 40 jaroj – La popolamasoj, kiun tian levis la ribelan standardon kun la signalvortoj „For la imperialisman militon! Neniam plu militon!“, certe ne povis imagi, ke post unu generacio la militorganizantoj denove estus pretaj por ripeta buĉado. Kaj tamen la dua mondmilito fariĝis kruela fakto.

Ĉiuj pacdefendantoj, ĉu junaj, ĉu maljunaj, sciu bona pri la historio de tiuj du mondmilitoj en nia jarcento. Ekvivu en ili malamego al la imperialistoj, kiuj elverŝis torentoj da sago de la soldatoj, de virinoj kaj infanoj. Tia scio kaj la memoro pri la mortintoj helpos al ni en nia plua batalo, por ke la estintaj kruelaĵoj neniam plu ripetigu, por ke la estonto fariĝu hela, feliĉa kaj prospera por la tuta homaro!

G.Holmkvist, Svedio

Krom tiu raportoj nia redakcio ricevis detalan informon pri la tuta procedo de la Verdun-manifestacio, tie k-do. P. Denis, sekret.de la Franca Esp.Packomitato en kiu li bedaŭras, ke orientgerman. gek-doj. ne ricevis ĝustatempe pasportoj por povi partopreni. Li konfirmas ricevon de sipmatileteroj de Esp-pacrondo el Stokholmo, de Esp.rondo el Liberec en Ĉeĥoslovakio kaj de la franca esperantista packomitato. K-do. P.Denis ankaŭ konstatas, ke la lingvaj baroj grave malhelpis la fluan procedon de la manifestacio ĉar interpretado forŝtelis multan valoran tempon. Bonvolu al ni pardoni, ke ni ne povas detale raporti, ĉar ege manka loko tie.

la red.

LANDO DE KARCEROJ KAJ KONCENTREJOJ

La separataj baletoj, ekaziĝinta la 4. de marto en Sud-Vietnamo per kiuj oni forte malrespektis la Ĝenevan interkonsenton el 1954 montris, kion kapablas la usona kolonialismo por pluen teni dependantajn landojn en sklaveca jugo. Dum silenta „patroneco“ de siaj britaj kaj francaj aliancanoj kreis la usona imperialismo en Suda Vietnamo faŝistan, politikan maŝinarion kiu faris el la lando unusolan grandan malliberejon.

La perforta dikatoro Ngo Dinh Diem prediktis al la lando balotstatuton, per kiu leĝigis la plej rigoroza pertigo de la vietnama popolo. Pli ol 30 000 da politikaj laborantoj estas arestitaj pro tio, ke ili aprobis la decidojn de Ĝenevo. Ĉiu, pri kiu oni deklaris, ke li aprobe parolis pri la ĝenevaj decidoj, estis senrajtigita partopreni la balotadon.

En la regularo de la balotleĝo (N-o.8, kap.2. artikolo 11) estas laŭvorte dirite, ke ĉiu deputito, kiu venas en konflikton kun la registara politiko povas esti arestita kaj ĉiuj kandidatoj kaj balotantoj povas esti submetataj al polica kontrolo por malebligi opozicion. Per registara dekreto n-o.6 el mezo de januaro estis anoncita la aranĝo de koncentrejoj. Ankoraŭ antaŭ la balotoj oni sendis proks. 60.000 personojn en la koncentrejojn. Tipa en tiu direkto estas unu el la 26 sud-vietnamaj provincoj, Phu Gven. Ĝi havas 129 malliberejojn kaj koncentrejojn. La preĝejoj, temploj, pagodoj kaj lernejoj servas anstataŭ karceroj por tiu, kiujn jam ne eblis pro manko da loko doni en la malliberejoj estas plenŝtopitaj.

Do, sub tiaj cirkonstancoj Ngo Dinh Diem en la balotoj „venkis“.

La liberaj aziaj popoloj ĝenerale starpunktas rifuze al tiuj balotoj en Sud-Vietnamo. Konsiderante la sud-vietnaman reĝimon kiel pli teruran faŝismon, ili plene simpatias kun la popoloj de norda eĉ suda Vietnamo, kiuj postulas, ke en nunjara julio okaziĝus ĝenerala liberajbaloto, kiu unuigus Vietnamon laŭ la interkonsentitaj deklaroj en Ĝenevo.

El gaz. de ĉeĥosl.kontraŭfaŝistoj „HLAS REVOLUCE“ de 1.4.1956 tradukis: Rudolf BURDA, P L Z E Ň

80.000 SUBSKRIBOJ – NERESPEKTITAJ

Kun la bona opinio, prepari vojon por atingi pacon, sinjoro Samuel CHEVALLIER, el politika vidpunkto neŭtrala homo, iniciatis jam en la jaro 1954 postulon al la svislanda registaro, ke ĝi malaltigu la militbuĝeton en 1955 aŭ 1956 je 50%. La ŝparota mono estu utiligata por malpliigi la mizeron parte en Svisio, parte en eksterlando. Preskaŭ sola, por plenumi tiun malfacilan taskon, li tamen sukcesis kolekti 80.000 subskribojn por tiu propono. Post plurmomataj diskutoj lia iniciativo estis konsiderata kvazaŭ senvalora pro la nura preteksto, ke la propono estas laŭ jurista vidpunkto malbone formuligita.

La svisa popolo tamen ĉi aferon serioze pripensis kaj larĝamase kritikis la registaron kaj ĝian konsilantaron. Samuel Chevallier ne perdis sian kuraĝon kaj helpita de pluraj eminentaj civitanoj li renovivigis sian proponon en pli jurista iom ŝanĝita formo. Li nun postulas akcepton de nova artikolo en la svisan konstitucion, laŭ kiu la registaro ne rajtus elspezi pli ol 500 milionojn jare por milit-aferoj. Ĉiu kroma elspezo estu per voĉdonado aprobita de la tuta civitanaro. Plie, sumo, kiu egalas 10% de la militbuĝeto estu utiligota por mildigi la mizeron per duono en eksterlando kaj per duono en Svisio.

Ni do tendu la rezulton. Certe ni ĉiuj dezirus plenan sukceson, por ke aliaj landoj povu preni de la neŭtrala Svisio ekzemplon.

A. THONEY
Lausanne-Svisio

KONTRAŬESPERANTISTO

(Epitafo)

Profesoro mondkonata fama
aron de landlingvoj bone konis,
sed en teorio estis lama
kaj por Esperanto li proponis
morton per verdikto la alama.

Estis li nek lasta, nek unua,
kiu pozis el posten altranga –
tamen ni al lia far` detrua
dorson turnas, ĉar klopodo sanga
restas al la ver` senkontribua.

Canko MURGIN

NE FORGESU RENOVIGI VIAN JARABONON! NI URĜE ATENDAS VIAN PAGON

6-

PRI LA EBLECO MALHELPI MILITON en NUNA EPOKO

(El raporto de N.S. Ĥruŝĉev en la 20a kongreso de la Komunista partio de Sovjet-Unio)

Milionoj da homoj en la tuta mondo demandas: Ĉu nova milito estas neevitebla, ĉu eble la homaro kiu spertis du sangajn mondmilitojn, devos trairi ankoraŭ unu?

Kiel konate troviĝas marks-leninisma tezo laŭ kiu militojestos ne eviteblaj tiel longe kiel la imperialismo ekzistos. Tiu tezo estis ellaborita en tempo, kiam la imperialismo unue estis mondampleksa sistemo kaj due, kiam la socialaj kaj politikaj fortoj de milito ne interesitaj estis malfortaj kaj ne sufiĉe organizitaj. Sekve de tio ili ne kapablis devigi la imperialistojn ne fari militojn.

Kutime oni eliras nur el unu flanko de la afero kaj konsideras nur la ekonomian fundamenton de la milito sub la imperialismo. Sed tio ne sufiĉas. La milito estas ne nur ekonomia aferaĵo. En la demando ĉu iĝos milito aŭ ne, estas la rilatoj inter la klasfortoj, la politikaj fortoj kaj la organizado kaj la celkonscia volo de la homoj, de granda signifo. Eĉ pli: sub definitaj premisoj la bataloj de la progresema socialaj kaj politikaj fortoj povas esti decidigaj en tiu demando. Ĝis nun estis tiel, ke tiuj fortoj, kiuj ne estis intersataj de milito kaj agis kontraŭ milito, estis malforte organizitaj kaj malhavis rimedojn por mezian volon kontraŭ la planoj de la militiniciatintoj ...

Tiel estis antaŭ la unua mondmilito ... Tiel estis ankaŭ antaŭ la dua mondmilito ...

Tiam estis la supre nomita tezo tute ĝusta. Sed hodiaŭ la situacio ŝanĝis radikale. La montendaro de la socialismo leviĝis kaj fariĝis potenca forto. En tiu tendaro la pacamantaj fortoj havas ne nur la moralajn, sed ankaŭ la materialajn rimedojn por malhelpi agreson. Al tio troviĝas granda grupo de aliaj ŝtatoj kun loĝantaro de multaj milionoj da homoj, ŝtatoj, kiuj decideme batalas kontraŭ la milito. La laborista movado en la kapitalistaj ŝtatoj fariĝis hodiaŭ potenca forto. La pacmovado estiĝis kaj evoluiĝis al potenca faktoro.

Sub tiuj cirkostancoj valoras kompreneble daŭre la tezo de Lenin, ke kie tiel longe, kiel imperialismo ekzistos, restos ankaŭ la ekonomia fundament opor aperigi militojn. Tial ni devas montri plej grandan vigilancon. Tiel longe kiel la kapitalismo ekzistos en la mondo, la reakciaj fortoj, kiuj reprezentas la interesojn de kapitalistaj monopoloj, aspiras al militaj aventuroj kaj agresoj kaj provos aranĝi militon. Sed ne ekzistas neevitebla fataleco pri milito. Hodiaŭ ekzistas potencaj socialaj kaj politikaj fortoj, kiuj havas al dispono seriozajn rimedojn por malhelpi al la militistoj aranĝi militon, kaj – se ili provus – por doni al la agresoroj pereigan baton kaj vanigi iliajn aventurajn planojn. Tial ĉiuj fortoj, kiuj procedas kontraŭ la milito, devas esti vigilencaj kaj batalpretaj, agi en unueca fronto kaj ne cedi en siaj klopodoj por konservi la pacon. Ju pli aktive la popoloj defendis la pacon, des pli granda estos la garantioj, ke ne estigos nova milito.

OKCIDENTAJ VOĈOJ POR LA PACO

La franca ministro por eksterlandaj aferoj Christian Pineau deklaris, ke li tute ne estas en akordo kun la ĝenerala celdirekto de la okcidentlanda politiko en la demando pri milito kaj paco. La akcento je pure militista forto aldonis Pineau, estas eraro: la okcidentaj landoj devas revizii sian eksterlandan politikon, disvolvi la principon de paca kunekzistado kaj afektivan pacpolitikon.

+

La Itala prizidanto Gronchi deklaris ĉe sia vizito en Usono, ke la interkonsentoj rilate militon devas esti kompletigataj „per novaj kaj vasthorizontaj formoj de kunlaboro“. Estas necese, pludiris la prezidanto dediĉi ĉiujn fortojn por malpliigi la militdanĝeron.

+

7-

La sovjet-dana komunikaĵo, publicita de la dana registaro-delegacio en Moskvo, deklaras:

„La partioj tute interkonsentas pri tio, ke la rilatoj inter la ŝtatoj devas esti bazitaj sur la fundamento de ne enmiksigo en reciprokaj internaj aferoj, respekto por la ŝtata suvereneco, neagreso kaj paca kunlaboro konforme al la principoj de la Unuigitaj Nacioj.“

+

La urbestro de Manchester, Anglio, Thomas F.Regan, bonvenigis la pliboniĝon de la anglo-sovjetaj in terilitoj kaj diris:

Ni bezonas neniam militon – nek malvarman nek varman!

NOVAĴOJ EL SOVJET-UNIO

En diversaj Esp-gazetoj aperis malĝustaj sciigoj pri la Esperanto movado en Sovjet-Unio. Bonvolu viajn informojn sekvante ĝustigi:

En S.U.la Esperanto-Asocio ĝis nun oficiale ne formiĝis. Estis organizita nur „Iniciativa Grupo de Sovjetuniaj Esperantistoj“ (IGSE), kies celo estas prepari la formiĝon de Asocio.

Nun IGSE ricevas informojn el diversaj lokoj de Sovjet-Unio pri la Esp-movado, organizas reton da respublikaj kaj regionaj reprezentantoj, kolektas informojn pri S.U.ekzistantaj Esp-bibliotekoj kaj pridiskutas la eldoblemon.

Samtempe IGSE klopodas ekhavi kontaktojn kun diversaj societaj organizoj koncerne uzadon de Esperanto en iliaj rilatoj kun aliaj landoj (Sov.Komitato de Pacdefendado, Antifaŝistaj Komitatoj de Sovjetuniaj Virinoj, de junularo ktp.)

En Sovjet-Unio funkcias kelkaj Esp-rondetoj kaj kursoj (mi korektas: La rap. estas de 5/3.- laŭ informoj ricevataj ĝis mezo aprila, jam funkcias multaj rondetoj kaj privataj eĉ oficialaj kursoj en kelkaj respublikoj – la red.)

La centro de IGSE troviĝas en Lingvosciencia Instituto de Scienca Akademio de USSR (Moskvo-G 19 Volĥonka 18). La prezidanto de la IGSE estas vic-direktoro de la Lingvosciencia Instituto d-ro.E. A.Bokarev, la sekretario estas k-do.S.V.Sariĉev, Moskvo-K-9, poŝt.kesto-1259.

Ankaŭ mi konigas al vi, ke ni preparas eldoni „PACO“n kaj ankaŭ propran bultenon. La redaktanto de IGSE-bulteno estas k-do.I.B.Hoves, Moskvo, poŝtkesto 1004.

Por Moskvo estis elektita MEM peranto k-dino N.I.Nikiforova anstataŭ k-do.Bokarev, kiun oni erare notis. La adreso de k-dino.Nikiforova estas: USSR, Moskvo-V 162, Mitnaja 23, kv.107, ŝia telef.n-o: V2-O655/V (V=litero, ne cifero).

Nia bulteno aperos en aprilo. La unua numero estos multobligita kaj ruslingva por distribui inter la IGSE-representantoj en Sovjet-Unio. Ĝi enhavos propagand-informan materialon, kiun tre bezonas niaj lokaj esperantistaj.

Kiel sekretario, mi ĉiu tage enregistras novajn kaj novajn adresojn de spertaj geesperantistoj, kiuj tamen ne ricevas la „PACO“n, aŭ „la Pacdefentanton“, kvankam ili ĉe mi abonis ilin. K-do.Toll, la ĉefperanto el Leningrado ne havas al dispono sufiĉan kvanton da tiuj gazetoj, por kontentigi ĉiujn

abonintojn. Ni petas pligrandigon de la ĝis liverata kvanto!

S.SARIĈEV

Sekret.de IGSE-Moskvo

Noto de la red.: Ĵus ni ricevis de la MEM-sekretario k-do. Balague informon, ke la kvanto de liverataj „PACO“j el k-do.Toll estos rimarkinde pligrandigota. Necesas ke la ceteraj IGSE- kaj MEM-perantoj en Sovjet-Unio ĝustatempe informo k-don. Toll en Leningrado kiom da ekz-oj. ili bezonos, por ke tiu povu ilin mendi ĉe la MEM sekretario. Ĉiujn reklamaciojn aŭ plendojn rilate ne ricevon de la MEM-organo „PACO“ direktu al k-do.Toll Boris, Lesnoj pr.20 kv.98, LENINGRAD-175, USSR kaj en kopio informu samtempe la ĝen.sekretarion de MEM, k-don.Anton BALAGUE, Kirchenweg n-o.12, Aŭstrio, SANKT PÖLTEN.

Ni komprenas la senpaciencecon de niaj sov.gek-doj., sed ili bonvolu kompreni, ke la org.aparato de MEM konsistas nur el libervolaj laborantoj, nepagitaj, kiuj nekapablas ankoraŭ ĉion tuj solvi.

ESPERANTO PLANLINGVO

En la hungarlingva literatura semajngazeto „UTUNK“ (Nia vojo), kiu estas ofic.organo de la Verkista Asocio de Rumana Popola Respubliko, en n-o.382 de 24.febr.1956,p.3 aperis raporto pri la labourista vivo en kemia granduzino. Ĝin verkis juna asistento de Instituto por Ekonomiaj Sciencoj, k-do. Sándor Huszár.

En la artikolo la verkinto aluda pri Esperanto. Jen lia mencio: „... Mi pensas en ni mem: la cifero plenumas tiun rolon en la scienco, kiun la lingvo Esperanto plenumas en la vivo. Per tiu ĉi lingvo la vojaĝanto sur kiu ajn parto de la terglobo komprenigas sin ...“

Julio CSAPÓ, SATU-MARE, Ruman.

PASTRO FORBECH PACPREMIITO

En Kreml oni en marto transdonis pacpremion al la konata norvega pacbatalanto, pastro Ragnar Forbech.

Post la ricevo pastro Forbech diris, ke li dum multaj jaroj estis pacifisto, kaj aldonis jenon: La pacifismo ne povas savi la mondon en la hodiaŭa danĝera situacio. Ĝi ne havas multajn anojn kaj ĝia celo kuŝas en la estonteco. Tial mi plenkore aliĝis al la nova pacmovado sub gvido de la Mondpaca Konsilantaro. Tiu movado, kiu kolektis pli ol 600 milionojn da subskriboj sur siaj apeloj kaj kiu havas la plimulton de la homaro kun si, estas de certaj rondoj en okcidento nomata: „maskita komunista organizaĵo“.

Mi mem longe estis suspektama, sed fine konvinkita pri tio, ke ĝi estas efektiva pacmovado, kiu havas unu solan celon: savi la homan genton kontraŭ novaj militoj.

MAKSIM GORKIJ PRI LA LIBRO

Kiel sur alia loko en ĉi gazeto estas menciite, 20 jaroj pasis de kiam la kultura gigantulo Maksim GORKIJ por ĉiam formetis la plumon. Sed en la kultura historio de la homaro li ĉiam vivos. Lia sinofera luktado dum sia tuta vivo por paco, kulturo, justeco kaj progreso ricevis en la nuna epoko novan signifon.

En lia esperantigita verkaĵo „KIEL MI LERNIS“ li estimas la kulturajn tradiciojn kaj elmontras, ke akceli la interŝanĝon de diversnaciaj kulturoj estas nepra kondiĉo por pliigi la komprenon kaj amikecon inter la popoloj. Li skribis tie i.a.:

„Amu la libron -fonton de scio, nur scio estas savkapabla, nur ĝi povas fari nin spirite fortaj, honestasj, konsciaj homoj, kiuj kapablas sincere ami homon, estimi lian laboron kaj kore amrigardi la belegajn fruktojn de lia seninterrompa grandega laboro“

Ami la libron signifas, ke pacesperantistoj havigu al si tiajn verkojn, kiuj estas saturitaj de profunda amo al paco kaj kiuj per granda realisma forto montras la veran vizaĝon de la milito.

Ankaŭ en Esperanto jam ekzistas kelkaj nuntempaj verkoj, eldonitaj en Ĉinio, Japanio, Bulgario kaj aliaj landoj. Ni rekomendas ke vi petu ilin de viaj tieaj korespondantoj. Estas jenaj:

Kantoj por la paco „de C.MURGIN-Bulgario“, „La plejforta voĉo de la paco“, de diversaj ĉinaj poetoj, „Infanoj de la atombombo“, „Infanoj de militbazoj“, „Kun la kadavro de la edzino“, „La polvo de la morto“, „Kanto de l' koro“, „La ĉasteco de Japanio“, „Hiroŝima“, „Aŭskultu la voĉojn el Oceano“, „En Ĉinio batalanta“, „Karcero“, ĉiuj en Japanio eldonitaj. Ĉiujn, tiujn verkojn vi legos kun streĉita spiro kaj ili postlasos en vi neimageblan malamon kontraŭ la milito kaj instigos vin al persista batalo por la sekurigo de la mondopaco.

PACAMIKO ESPERANTISTO!

Ĉu vi instigis vian kunulon aliĝi al nia porpaca Esperanto-movado ?

Faru tion senprokraste !

MALNOVIĜINTA PEDAGOGIO

Inicitaj personoj asertas, ke la okcident-germanaj instruistoj ĝenerale silentas en la histori-instruado pri la perfortaĵoj de la naziismo. „Niaj historiinstruistoj finigas la instruadon ĉe la jaro 1871 – ĉiuokaze ne pli longe ol ĝis 1914“, diris persono pri la okcident-germana instruado bone informita.

La difektoj de la naziismo en la publika instruado tute ne estas riparitaj en Okcidentgermanio. Montriĝas inter aliaj ekzemploj, ke la granda germana poeto Heinrich HEINE estas nekonata al la plej multaj lernantoj, ankaŭ en altlernejoj. Kelkaj konis lin, sed kiel – Judon.

9-

INTERNACIA FERVOJISTA KONGRESO EN STOKHOLMO

La fervojistoj certe pli ol aliaj profesiaj grupoj renkontas kun lingvaj malfacilaĵoj dum sia okupo. Tial estas nature, ke ili jam frue interesiĝis pri Esperanto, fondante specialan organizon „IFEF“ (Internacia Federacio Esperantista Fervojista), kies centro troviĝas en Nederlando.

Dum la milito tia organizo same kiel aliaj esp-istaj organizoj suferis pro la rompita kontakto. Post la milito tiu organizo rapide reaktiviĝis kaj nun ĝin partoprenas jam 24 landoj. En 16 landoj la federacio havas sekciojn: Nederlando kun 221 aliĝintoj, Francio 335, Danlando 89, Aŭstrio 101, Svisio 45, Norvegio 50, Svedio 91, Germanio 430, Aŭstralio 17, Italio 83, Finnlando 60, Britio 41, Belgio 12, Saarlando 16, Hispanio 45, Jugoslavio 34, kaj krome troviĝas izolitaj anoj en Japanio, Ĉeĥoslovakio, Germana Dem. Respubliko, Portugalio, Usono, Maroko, Algerio kaj Nord-Rodezio.

Ĉiujare la federacio havas kongreson, ĉijare en Stockholmo la 13-18an de majo. Oni kalkulas kun ĉ.400 partoprenantoj. La Svedaj Ŝtataj Fervojoj donacis al la kongresa komitato 3.000 svedajn kronojn, ĉar oni opinias, ke la laboro de la sveda federacio estas tre valora. La kongresprogramoj estas tre abundaj, ili konsistas el laboroj, ekskursoj kaj ankaŭ distraĵoj. El nia porpaca vidpunkto la kongreso estas signifoplena, ĉar ĝi kolektas esp-fervojistojn el la „du mondoj“, kiuj dum la kongresaj tagoj havos okazon interkonsiliĝi ankaŭ pri aliaj aferoj krom la speciale fervojistaj.

Joĉjo

Esperantistaj organizoj kaj individuaj gek-doĵ. kiuj volus sendi salutojn al la kongreso, notu ĝian adreson: KONGRESO de IFEF, k-do.Hjalmar OLSSON, S:t Eriksgatan 85,2 A, STOCKHOLM, Svedio.

DAG HAMMERSKÖLD OPTIMISTA

En intervjuo en sveda radioelsendo en marto la UNO prezidanto Hammarsköld diris, ke problemoj unue nesolveblaj ĉe la ministro-konferenco en Genevo nun efektiviĝas pere de la diversaj organoj de „UNO“.

IOM POST IOM NI ENPENETRAS

Laŭ peto de niaj svedaj MEM-anoj la ĉefredaktoro de la centra organo de Sveda Komunista partio „NY DAG“ aprobis aperigi en tiu gazeto regulan svedlingvan Esperanto-angulon.

TIRANECO AL NOVULOJ

La teatraĵo „Disciplino de Calder Willingham“ prezentas usonan soldatakademion kaj unuavice desegnas la teroron de malpli junaj kadetoj, kreskintaj el cinka konscio pri potenco super la pli junaj rekrutoj. La teatraĵo montras, ke la malnoblaĵoj estas de „supre“ akcelataj por nepra subigi de la „hommaterio“ al potencaparato kies esteco eĉ ne estu komprenata de simpluloj.

Se oni degradas la homojn ĝie nuraj ricevantoj de ordonoj, oni perdigas ankaŭ ĉiujn aliajn

personajn konvinkojn, forprenas ilian dignon kaj kreskigas en ili senbridan krutecon kune kun civitana timaĉo.

La fina pun-atingo de la plej malbona inter la kadetoj servas nur al la konservado de la mieno. La akuzito provas antaŭ la juĝistoj, ke liajn krimojn faris la spirito de la militista perfortado. La generalo provas senkulpigi la aferon antaŭ la publiko, citante la „kulturon de jarmiloj“.

Ĉi tiu bildo montras ne nur Usonon, sed preskaŭ senescepte ĉiujn ŝtatojn kun armeoj. Do evidentas, ke la pacon oni povas prepari nur per ĉiea kaj perfekta malarmado. La „kulturo de jarmiloj“ fine devas esti anstataŭigata per la kulturo de la homo. Jen ankaŭ leciono de la historio, esprimebla per jena formulo: La ĉefaj militeksploziantoj estas la tiranoj, kiuj naskiĝas en la kovejo de ĉiam fuŝata demokratio.

D-ro.A.HALBEDL

Ĉu vi jam renovigis vian abonon?

10 –

JAPANAJ FILMOJ INSTIGIS MIN

Jam de longe mi provis labori por la paco pere de Esperanto disversmaniere. Mi provis infan- kaj junular-korespondadon, internaciajn ekspoziciojn de desegnaĵoj k.t.plu. – Mi provis kunlabori kun la packomitatoj, la virina kaj instruista asocioj ktp. Sed en Britio tiuj provoj restis preskaŭ senfrukaj.

De la eksterlandanoj mi ricevis valoran materialon, kiu restis ĉe mi senutila, pro la blindeco de la neesperantistaj organizoj, Mi similis al telefono, kiu havas nur ricevilon!...

La plej valora materialo venis el Japanio Mi lernis pri la mirinda „Popol-film-movado“, kies inspiro kuŝis en la edukado al socialismo kaj paco. Mi ricevis fotojn kaj informojn pri la filmoj.

Tiajn filmojn mi neniam antaŭe imagis! Al mi, ili estis kvazaŭ la sango kaj spirito de suferanta popolo kiu, spite ĉion, energie boras novan vojon al la lumo, al feliĉa estonto. Mia admiro estis senlima! Tiam mi decidis koncentriĝi je la japanaj filmoj. Laŭ deziro de japanaj esp-istoj mi provis aranĝi interŝanĝon de filmoj inter Britio kaj Japanio. Mi sukcesis ... sed, eksporto el Japanio ne funkciis!

Post tri jaroj, la firmao, kiu jam konsentis pri interŝanĝado finfine ricevis la filmon „LA INFANOJ DE HIROŜIMA“, kiu alvenis ĉi tien tra Svedio – kun ĝojo. Mi tuj donis al dispono miajn informojn pri ĝi, por helpi al ĝia propagando. – Sed la aliaj filmojn oni ĝis nun – ne sukcesas venigi!

Obstine mi serĉis metodon konigi ilin alimaniere al la publiko. Mi lernis, ke en Japanio specialaj firmaoj produktas filmetojn por magia laterno (aŭ projekciilo), filmetojn, kiuj rakontas la grandajn filmojn. – Per tiuj ĉi filmetoj la japana pacmovado kapablas atingi la plej malproksimajn vilaĝojn kaj urbetojn, en kiuj kinejoj ne troviĝas. – Tia estas la celado de la gvidantoj de tiu admirinda film-movado! –

Lerninte pri la filmetoj, do pro kunlaboro kun japana s-ano, kuracisto en hospitalo, fervora pacamiko kaj energia homo, li kaj mi decidis interŝanĝi filmetojn, kiuj libere vojaĝas per la poŝto. Mia korespondanto aĉetis filmetojn kaj sendis ilin al mi kun esperantaj tekstoj kaj klarigoj. En Londono la afero estis, bori novan vojon al la publiko. Mi ne rakontos la malfacilaĵojn, la elreviĝojn ktp., kiuj baris nian trairon. Sufiĉas diri, ke post jaroj, nun la intereso ekvekiĝas! Baldaŭ okazigos grava kunveno. Mi parolos pri „La Popol-film-movado“ kaj prezentos du filmetojn kun la helpo de aktoroj kaj kantistoj. Ni esperu havi sukceson!

Se mi bone sukcesos fari tiun unuan paŝon, la plej gravan, la aferon poste iros pli glate. Mi havas grandajn ambiciojn pri la sekvontaj filmetoj.

Ti ĉi estas nur la duono de mia plano. Rekompence mi nepre devas sendi britajn filmetojn al miaj japanaj amikoj. Bedaŭrinde ne ekzistas samvaloraj filmetoj ĉi tie, kie oni produktas nur tiajn, kiajn

oni opinias taŭgajn por niaj lernejoj. Tamen mi sukcesis elekti kelkajn el ili, kiuj nun vojaĝos de lernejo al lernejo en Japanio.

Kompreneble mi volas fari pli. Mi nun venis al la konkludo, ke mi faros kun miaj amikoj proprajn filmetojn. Poste mi sendos ilin ne nur al Japanio, sed al ĉiuj landoj kiuj deziras partopreni mian planon.

La unua filmeto temos pri „HELSINKI-PAC-KONFERENCO“. Mi kolektas nun fotojn de la britaj Pac-delegitoj, kiujn mi kompilos kaj prezentos kun teksto. Karaj gek-doj, ĉu vi volas helpi? Mi deziras enkonduki en tiun ĉi filmon esperantistan sekcion. Ĉu vi povas sendi al mi kontribuaĵojn de esperantistoj el via lando, kiuj ĉeestis la kongresojn, ĉu en Helsinki, ĉu en Varŝovio?

Por tiaj fotoj oni povas klare montri kiom facile, kiom libere diversaj nacioj interrilatas en internaciaj konferencoj. Estus tre grava por nia MEM, ĉu ne?

Ĉu vi konsentas, ke mia plano donas novajn perspektivojn? Ĉu vi povas helpi kaj sendi al mi fotografaĵojn kaj tekstoj, kaj se eble kantojn ktp. Zorgeme mi resendos ilin al vi. Mi nur volas fotografii lin.

11-

Nia dua filmeto verŝajne temos pri Londono, nia tria pri Coventry, la urbo, kiu estis preskaŭ detruita dum la milito. Poste mi rakontos pri la vivo de la brita popolo. Rilate tion ĉi mi jam faris alvokon la sekretarioj de la packomitatoj en Britio por ke ili sendu kontribuaĵojn, ĉu pri laboristoj en industrio ĉu pri karbministoj, ĉu pri pac-aktiveco ktp.

Mi konkludas, ke bildo efikas pli ol presaĵo. Kiam plene funkcios interŝanĝado de filmetoj, libere portante trans la landlimoj, sur siaj celuloidaj rubandoj konkretajn atestojn de internacia amikeco, la paco gajnos novan forton.

Alia afero estas:

LA JUNULAR-FESTIVALO-MOSKVO 1957

La progresenaj esperantistoj estas ne multnombraj en Britio, same kiel en kelkaj okcidentaj landoj. Pripensante tion kaj la festivalon 1957, mi kaptis la okazon antaŭ du semajnoj, atentigi la sekretariojn de la britaj packomitatoj (dum konferenco) pri la grava okazontaĵo en Moskvo.

Mi klarigis, kial ili nepre devas sendi siajn esperantistajn delegitojn. Sed mi aldonis: estas necese, ke ĉiu packomitato starigu Esperanto-kurson sub sia patronado! Ili rigardas min kun granda surprizo. La sugesto estas tute nova! Mi nun atendas la rezultojn.

Ĉiuj MEM-anoj memkoprenas la gravecon de tiu festivalo rilate al la internacia amikeco, daŭra paco kaj Esperanto. Grave estas, tuj komenci la preparojn al tiu unika okazontaĵo! Tiu ĉi raporton vi povas uzi laŭ via bontrovo, ekz. por aliaj gazetoj. Mi senpacience atendas viajn respondojn, konsilojn kaj kontribuaĵojn.

K-dino F.PARAIGE
10, Woronzow Road, St.John`Wood
LONDON-N.W.8,Anglio

SENUTILAJ ARMAD-ELSPEZOJ

Dum ses jaroj, de 1949-1955 la membroŝtatoj de „NATO“ uzis por armadoj 900foje pli ol „UNO“ por helpo al subevoluintaj landoj.

ESPERANTO ĈE LA MONDJUNULARA FESTIVALO EN MOSKVO 1957

Kunlaboranto de la budapesta centro de la Demokrata Mondjunulara Federacio, k-do. László Tiszal konvinkiĝis post vizito ĉe esperantistoj en Varsovio pri la praktika kaj facila uzado de Esp-o. Li sciigis, ke la Mondjunulara Federacio (adr. Benczur u. 36, BUDAPEST-VI. Hungario) pritraktos

proponon por pli vasta utiligo de Esperanto dum la festivalo en 1957 en Moskvo kaj pri ebla eldono de esperantlingva presaĵo, se el diversaj landoj venos multaj petoj.

La federacio estas preta ankaŭ akcepti inter siaj membro-organizaĵojn la esperantistajn junular-organizaĵojn. Do eluzu multnombre ĉi eblecon, kiu precipe en orient-eŭropaj landoj fortigos la uzadon de Esperanto, sed povas efiki tutmonde en 92 ŝtatoj.

TRE NEPOPULARA ESTAS LA NOVA ARMEO EN OKC.GERMANIO

Laŭ multaj unusencaj informoj evidentiĝas, ke la germana popolo estas kontraŭ la rearmado. Nur la malnovaj militistoj kaj malsaĝuloj ekflaras matenfrenon pro tiu armeo, kiu baziĝas je ĝenerala militservo.

Sveda ĵurnalisto en Munĥeno intervjuis komerciston tie (kiu deziras esti anonima) pri la restarigo de la nova germana armeo kaj ricevis jenan respondon:

„Ni germanoj, ĉiam estis stultaj. Ni laboradis kaj laboregis kaj kreis militistaron. Poste eksplodis militoj kaj ĉio frakasiĝis. Kaj la laboro denove komenciĝis. Sed ĉi foje ni ricevis vere instruan lecionon – ni ne plu volas militon. Ni ne volas fariĝi soldatoj. Kaj ĉi foje estas Usono, kiu volas, ke ni fariĝu soldatoj! Neniu scias, kiel tio finiĝos.“

Jam formigas nova germana aerfloto. La pilotoj estas instruataj ĉe usona aviadilbazo Landsberg en Bavario. Oni uzas usonaj maŝinojn kaj instruktorojn. Novaj aviadejoj estas disponitaj de Usono en Bavario (Bayern). Krom tio 400-500 da aviadil-pilotoj estos instruataj rekte en Usono. Daŭre minacas nova danĝero! Necesas esti preparita!

PRINTEMPA VENTO

Freŝa vento Orienta
 flugu ĉirkaŭ ter` en rondo
 kaj per flustro elokventa
 diskonigu al tutmondo
 pri evento eminenta

La kongres` dudeka pasis
 de l` Partio Komunista
 kaj emfaze ĝi postlasis
 da spirit` pri kunekzisto ...
 ... kulton al person frakisis.

„For milito malbenita
 for kverelo senkompreno!“
 Restas ĝia la merito,
 ke nun estas pli bonvena,
 pli hardita pac-spirito.

Historio de l` partio
 kaj de tuta, la homaro
 ĉiam kun favor-mencio
 memorigos al idaro
 ĝia rol` internacia.

Freŝa vento Orienta
 flugu ĉirkaŭ ter` en rondo,
 kaj per flustro elokventa
 diskonigu al tutmondo
 pri event` ĉi eminenta!

Al 20a kongreso de la Komunista Partio de Sovjet-Unio dediĉas

Canko Murgin

TROVIĜAS ANKORAŬ MULTAJ ANALFABETOJ EN LA MONDO.

Laŭ Statistika Jarlibro de La UNUIĜINTAJ NACIOJ troviĝas en Portugala Gvineo (Afriko) 99,7 elcentoj da analfabetoj. En Alĝerio 94 kaj en Egiptio 74,5.

Centra Ameriko – Bermudo havas 89,3 elcentojn, Panamo 28, Gvatemalo 70,3.

Inter sudamerikaj landoj estas nombro de analfabetoj en Argentinio 13,3 elcentoj, en Brazilio kaj Venezuelo 51.

En Azio estas en Tailando 46 elcentoj de la loĝantaro analfabetoj, en Filipinoj 37,8 kaj en Hindio 82 elcentoj.

La supra statistiko ampleksas personojn de 10 jaroj kaj plie.

FINE ANKAŬ GERMANIO-DDR

En kunsido de la packomitato en RADEBEUL, ties sekretario anoncis, ke oni aprobas uzi oficiale

Esperanton por la paco. Eksterlandaj gek-doj estas petataj proponi sian kunlaboron por interŝanĝi afiŝojn, spertojn, kontaktiĝi lernejojn ktp. Adreso: ORTSFRIEDENSRAT, Einsteinstr. RADEBEUL Germanio-D.D.R.

raportas: W.RANFT

JAM TAGIĜAS!

De k-do.Hirsch el Bonnewitz ni ricevis salutleteron el monata kunveno, de esp-pacamikoj, kiu okazis la 25/3an en Dresden kaj kiun ĉeestis 50 gek-doj. Ni kore gratulas al tiu ĉi sukceso kaj esperas, ke nun baldaŭ nia movado ankaŭ en la ceteraj DDRurboj ekvivos.

HARZREGION – PACREGION

Juvelo de l` germana lando,
Mirinda via paca sfer`
Montaro kvazaŭ verdgirlando,
Kaj kiom pura la aer`.

Eterne reveret` murmuras
Rapidas de la montoflank`.
Nun inter pinoj eksusuras
Parol` de l` dolĉa venta lang`.

Revante kuŝas blua lago
En valo, estas terspegul`.
Jam levas sin en mi imago,
pri la klarida mont-okul`.

Ĉu baldaŭ bela nimf` aperos
kaj banos sin en la kristal`
Dum ŝi la koron ekkonkeros
De mi, vaganto, terŝakal`?

Ĉu migros tra l` arbaroj gnomoj
Timantaj pri la mont-gigant`?
Ĉu sorĉistinoj kaj fantomoj
Vespere vagos en la land`?

Promesokisoj, ĉirkaŭpremoj
Dum ĝuo de la ampasi.
En korpoj la voluptaj tremoj.
En koroj kantas simfoni.

Nun sidas mi sub sola pino.
Sciuroj manĝas de la man`.
En mia apudeco ino.
Por mi ĝi estas la laŭdan`.

Vin, regiono plene paca,
Travagis mi, la vagabond`.
Ripozsalon por homo laca.
Naturotemplo de la mond`.

Ĉi tie iam Goethe paŝis.
Meditis pri vivcel` kaj ver`.
Milfoje ĝuis kaj ekstazis
Nur korpe restis sur la ter`.

HARZPOETO.

LA ESPERANTOKANTO KAJ LA „MEM“

De l' pratempmateno la hom` emas levi
rigardon al lumo de senlima spac`
Li kiel birdo scipovas ankaŭ peri
per tona muĝ` sopiran de ĝoj` kaj ekstaz`

Per ĉi tiuj vortoj el „HIMNO AL LA KANTOJ“ de E.Kremser estas esprimita la povo de la kanto por lumigo de la vivo kaj por doni klarigan rebrilon super la laboro.

Ek de la infanaĝo de la homa gento ĝis niaj tagoj, la kanto parolis al la koroj de la homoj. Ankoraŭ la kanto havas plenan vivforton kaj tial ĝi pli potence sonu ĉe la kunvenoj de la progresemaj pacdefendantoj. Ĉar, same kiel la laborkanto origine estis organizilo por la kolektivaj penoj, ankaŭ la Esperanto-kanto servas al niaj organizceloj.

Kiel la primitiva kantado en la kolektiva laboro estis ĝemo al la poemo de ĉiuj tempoj, tiel ni, kiam tiu ĝermo elkreskis en nia Esperanto-ĝardeno, gradu ĝiajn florojn kaj disŝutu ties generpovon por la utilo de la afero de l' paco!

Ĉu ni ne por tiu celo lernu de la antikvaj Grekoj kaj en pli alta grado ol ĝis nun ni amu la kanton kaj konsciiĝu pri ĝia potenco? Kaj kiel alte la Grekoj taksis la potencon de la kanto! – Orfeo laŭdire povis per sia kantado aŭskultantigi la sovaĝajn bestojn kaj igi la rokojn plorantaj. Ni ĉiuj legis pri la sireneoj, kiuj sur siaj rokinsuloj kantis tiel dolĉe, ke la marveturistoj estis kortuŝe trafitaj de nerezistebla sopiro kaj direktante siajn ŝipojn kontraŭ la ŝeroj, ili pereis. Ankaŭ la fama kanto pri „Lorelej“ de H.Heine, esperantigita de d-ro.Zamenhof, kiuj sur roko en Rejno (riverego) logis al si pretervelirantojn en la morton per la ravo de iliaj kantoj, esprimas ankaŭ la tradician ideon la potenco de la kanto.

Nenio povas kiel la kanto rerakonti noktenigran malesperon kaj senbridan Ĝojegon. Kaj ne malplej valore: la kanto povas rerakonti pri fidplena kredo kaj sankta sopiro al iu celo. Kaj ĝuste pro tio la packantoj en Esperanto estas gravaj, ĉar ili havas la kapablon levi kaj kolekti en preskaŭ same alta grado kiel La Internacio, La Espero kaj Tagiĝo, kiuj tri kantoj kredeble estas plej ofte kantataj.

Lasu do la Esperantokantojn eksoni ĉe kunestadoj, klubkunvenoj kaj ekskursoj. Sed la pacesperantistoj en sia propra intereso bezonas varii la kantonper novaj, flamigaj packantoj kiuj respeguligus ilian lokon en la kultura kaj progresiga laboro. Jam troviĝas tiaj. Necesas nur utiligi ilin!

KANTAMIKO

MAKSIM GORKIJ – 20JAROJN MORTA

La 18an de junio pasis 20 jaroj de post la morto de Maksim GORKIJ. Tamen li daŭre vivas en la koroj de la popoloj tutmondaj. Ĉar lia dumviva idealo estis amo al la homoj kaj la deziro de la plej bono al ili. Tial estis memkomprenebla, ke li, kiam la mondmilito en 1914 eksplodis, iĝis batalanto por la afero de la paco kaj kontraŭ tiuj fortoj, kiuj pelis la popolojn en la sangan mondon de la milito.

Ni pacdefendantoj havas la grandan respondecon, heredi kaj disvolvi liajn kulturajn tradiciojn por ebligi la efektivigon de lia alta celo – interpopola amikeco kaj daŭra paco!

„LA VERDAJ AGRESOROJ“

American Esperanto Magazine tranĉis el „Chicago Daily News“ jenan artikoleon:
„En soldata kampo ,Chicago, 75 soldatoj manovris kaj respondis al ordonoj donitaj en Esperanto. „Dekstren!“ kriis serĝento Maxie Yates, kaj 75 verde vestitaj soldatoj turnis sin dekstren. La soldatoj estis membroj de la grupo „Agressor“, parto de usona armeo, kiu oficiale uzas Esperanton.“

Ni pacdefendantoj esperas, ke tia uzado de Esperanto restos por ĉiam nur unikaĵo. Kaj ni esperas, ke en la estonta socio ĝi ne povos esti uzata ev. agresoroj, tial ke tie kaj ĉie la pacdefendantoj estos sukcesintaj forĵeti ĉiujn armilojn sur balaĵojon.

ŜIRMADO KONTRAŬ ATOM-ARMILOJ

(Speciale verkita de MUDr. V. ŘEPKA, majoro de ĉeĥoslovaka armeo por nia organo.)

La atomenergio reprezentas malkovraĵon de nia epoko, ĝi signifas novan epokon en la historio de la homaro kaj profunde influos la estontan evoluon.

En aŭgusto 1945 eksplodis la unuaj atombomboj super Hiroŝimo, kie pereis 70.000, kaj en Nagasaki 40mil da homoj, kaj proksimume la sama nombro estis vunditaj. De tiu tempo kvazaŭ ruĝa fadeno traĝas la atomenergio la internaciajn konferencojn depost la dua mondmilito. Atoma diplomatio fariĝis „Alfo kaj Omega“ en la usona politiko, penanta paroltrompi la propran popolon pri danĝero de milito fare de komunistoj kaj aliflanke minacante, uzi potencon de la forto.

Fakte, la atomenergio estas terura armilo kaj tial necesas batali kontraŭ ĝia misuzo. Sed kontraŭ atomarmiloj ekzistas ebleco sin ŝirmi, kaj ne estas kaŭzo por paniko.

La usona atomdiplomatio kaj atoma sociologio celas timigi la mondon, influi la ĝis nun de ili sateligitajn ŝtatojn, premi ilin politike kaj ekonomie kaj peni akiri la regadon de la mondo.

En 1945 la atomatako kontraŭ neŝirmitaj japanaj lignourboj estis surprizo: ne ekzistis kontraŭ-aviadila ŝirmado, ne estis anoncita alarmo, ne ekzistis kontraŭfajraj ŝirmaranĝoj kaj la loĝantaro ne troviĝis en rifuĝejoj. Ne estis kontraŭaviadilaj baterioj radare direktataj kaj ĵetaviadiloj. Tiam oni nepraktikis sangotransfuzon, ne estis antibiotiko, oni ne konis modernan kuracadon de brulvundoj, ne ekzistis modernaj kuraciloj kontraŭ diareo kaj multaj aliaj aferoj. Oni ne sciis kuraci la postsekvojn, kaŭzitajn de radioaktiva radiado. Dum normala cirkostanco tiutempe, la nombro de la viktimoj estus malaltiĝinta almenaŭ je unu dekon.

La eksplodo de atombombo similas al tiu ordinara bombo nur estis ĝia efiko tre multobligita. Ĉe eksplodo super la tero brileganta globo, la brilego instinktive devigas fermi la okulojn, kio signifas ilian ŝirmon. Necesas tuj kuŝiĝi en fosaĵon, tranĉeon k.t.p. Kun la lumradiado disvastigas varmaradiado, kiu haltiĝas per iu ajn tavolo da materialo. Helaj ŝtofoj pli ŝirmas korpon, ĉar ili pli forpuŝas varmon. La disvastigantan aerpremon el la loko de la eksplodo rezistas betonkonstruaĵoj kaj rifuĝejoj. Ekzemple rifuĝejo, havanta unumetran tertavolon, troviĝanta rekte en la loko de la eksplodo, rezistas. La forto de la aerprema ondo dependas de la tereno, malantaŭ teramasojkreiĝas prem-ombroj. Fajroj estiĝas sekundare en la ruinoj de ne estingitaj hejtiloj, pro elektraj fuŝ-cirkvitoj k.simile.

Krom la premondo kaj varmaradiado efikas la radioaktiva radiado. Ĉe la eksplodo multe dependas de la meteorologiaj kondiĉoj kaj de la alteco de la eksplodo. Kobalto, troviĝanta en la ŝelo de la bombo, kreas nubon similan al fungo. Post eksplodo okazinta en respektiva alteco ne postrestas sur la tero radio-aktiveco. Neŝirmitaj homoj, trafitaj de la radiado, spertas svenon, vomadon, diareon, perdiĝon de blankaj kaj ruĝaj sangoj, elfalon de la haroj kaj steriliĝon. Akvo kaj nutraĵoj ne ŝirmitaj kontraŭ radioaktiva polvo, fariĝas post la eksplodo ne uzeblaj. En infektita terenspaco estas malpermesite manĝi, trinki kaj fumi.

En 1945 pli ol 80% viktimiĝis kaŭze de la eksplodo kaj nur eble 15% kaŭze de la radiado, kiu akompanis ĝin. Estas interese, ke kelkaj Japanoj, hazarde troviĝintaj dum la eksplodo en rifuĝejo, transvivis la atakon eĉ en la ĉirkaŭaĵo de 300 metroj de la eksplodcentro. Hodiaŭ ni scias, kiel batali kontraŭ la sekvoj de tiu ĉi radiado. La danĝero, kaŭzita de la Gama-radioj kaj neŭtronoj, sekve de la eksplodo, estas tre mallongtempa. Pli ol duono de la radiado estiĝas dum la unua sekundo de la eksplodo kaj 98% dum la unua minuto. Pro la granda varmego estiĝinta dum la eksplodo ĉiuj materioj de la atoma bombo laŭvorta elvapiĝas. Tiuj ĉi gasoj, kiuj estas radioaktivaj, leviĝas kun la ege varmigita aero alten, sekve de kio, se la atom-bombo ne eksplodas rekte sur la tero aŭ en akvo, ne estas la ĉirkaŭaĵo de la eksplodo arĝita de radioaktiva infekto. La atombombo estas dutranĉa armilo, ĉar la gasoj post malvarmiĝo povas en malproksimaj lokoj reveni al la tero kaj ĝin infekti.

La savantaro estas akipita per ŝimvestaĵo kaj dozimetroj por povi konstati ĉu la tereno estas infektita, ili havas maskojn kun arsina intertavolo kaj altajn piedvestojn. Post la laboro necesas radikala duŝado. Post paso de tempo radioaktiva infekto rapide malpliĝas.

La klopodoj de la pactendaro kaj Sovjet-Unio, kiu savis la popolojn de Eŭropo antaŭ la faŝista elmurdado, sukcesos eluzi la atomenergion por la prospero de la homaro. Ni ĉiuj aktive devas batali por la paco kaj elkonstruo de socialismo. La fortoj, kiuj malhelpas niajn klopodojn, devas esti al la mondo forbalaitaj!

La batalo kontraŭ la atomarmiloj samtempe estas batalo por paca eluzo de la atomenergio kaj por la venko de la pactendaro kaj socialismo,

Tradukis: MUDR. Josef ČERNÝ

Nia redakcio volas ĉiujn fakulojn kaj speciala la japanajn, inĝeneron Bostwick kaj aliajn, kiuj persone spertis dum la eksplodoj en Hiroŝima kaj Nagasaki, al publika diskuto pri tiu ĉi grave problemo. Ĉiun kontribuon certe ni interpretos al la aŭtoro de ĉi supra raporto kaj laŭ ebleco ni ilin ankaŭ represos ĉi tie kaj en aliaj kun nia organo fratigitaj eldonadoj. Sendu viajn kontribuojn al k-do. Rud.BURDA, Palackého nám.č.6, PLZEN, Ĉeĥoslovakio

GERMANAJ GEKAMARADOJ ATENTU!

Ĉi sube ni publikigas du gravajn dokumentojn, kiuj klare diras, ke la orient-germanaj esperantistoj havas jam tute liberan vojon por sia porpaca agado per Esperanto:

„SOCIALISTA UNUECA PARTIO GERMANIA“

Centra Komitato Zentralhaŭs der Einheit,

BERLIN-N 54, W.Pieckstr.1, Ruf 42 00 56
Berlino, la 15.11.1955

Al la

Direktoro de Lernejo de Paco k-do.L.Schödl, Rosa Luxemburgstr.37, NEURUPPIN.

Ŝatata kamarado Schödl!

Mi ricevis sciigon pri via petrskribo rilate Esperanton. Ni petis rilate tiun ĉi aferon la kamaradon Willmann de la Germana Packonsilantaro, ke ĉiuj esperantistoj, troviĝantaj en nia respubliko apliku sian agadon en la kadro la pacmovado. Mi petas vin, ekrikti kun kamarado Willmann.

Kun socialista saluto

Zentralkomitee der SED
subskribo: Wandel, sekr.

Kaj la dua dokumento:

Poŝtoficejo de la Centra Komitato de Socialista Unueca Partio Germ.

Berlino, la 18.1.56
26/Le/Ra/95/55

Al k-do.
Otto SCHUBERT
Niesky OL.
Auf dem Sande 8.

Kara kamarado Schubert!

Responde je via letero de 11.de decembro ni sciigas al vi, ke la de vi menciita problemo estas nuntempe ĉe ni funde ekzamenata kaj konŭsltata. Tuj, kiam la afero finĝos, vi ricevos definitivan informon.

Jam nun ni povas al vi komniki, ke korespondadon, kiu servas al la paco pere de Esperanto, oni neniel povas riproĉi.

Kun socialista saluto

subskribo (nelegebla)

Ni bedaŭras, ke ni ne povis al niaj legantoj pli frue prezenti ĉi dokumentojn, sed ili cirkulis inter la diverslokaj germ.gek-doj, kaj ni ankaŭ opinias, ke tio estis pli grava, ĉar la rezultoj montrigas jam.

PACO DONAS KULTURON - KULTURO PACON

Sovjet-Unio. Neniu lando havas tiom da lernejoj, gimnazioj, altlernejoj, sciencaj esplorinstitutoj kaj laboratorioj, teatroj, kluboj, bibliotekoj kaj aliajn kultur-kaj klerigajn institutojn kiel Sovjetunio.

En Sovjetio estas enkondukita generala sepjara lernejinstruado tiel en urboj, kiel en la vilaĝo. En la grandurboj la lernejinstruado plej ofte estas dekjara.

Kompare al la antaŭmilita tempo la nombro de specialistoj kun altlerneja klereco kreskis ĝis hodiaŭ jene:

En Kazakstano kun 280 %, en Kirgizio kun 380 %, en Taĝikistano k. Moldavio kun 240, en Turkmenio kun 230, en Estonio kun preskaŭ 200 %.

La nombro de sciencistoj kreskis dum la sama tempo en Ukrainio kun 50 %, en Latvia kaj Azerbajĝana S.S.R. 100% kaj iom pli, en Kazakstano pli ol 150 %, en Estonia SSR. preskaŭ 200 %, en Litovia kaj Karelia SSR kun pli ol 200 %.

Laŭ raporto de N. Ĥruŝĉev

La biblioteko de la Scienca Akademio en Leningrado interŝanĝas librojn kun 100 diversaj esplorinstitutoj de Hindio. Dum nur unu jaro ĝi ricevis pli ol 1.000 librojn el Hindio. La leningrada biblioteko dum 1955 sendis 3.000 librojn.

LA KOMPLIKAJ LINGVOJ en Arabio kaj ĉirkaŭ landoj estas adaptitaj al la klavara tabulo de linotipo (kompostmaŝino). La sama estas efektivigita en Etiopio.

Svedio: Ĉirkaŭ 40 gazetoj en Svedio havas nun teletipan kompostadon.

Norvegio: la agrikultura departemento planas eldoni gazeton en la lapona lingvo.

Ĉinio: Laŭ informo el Peking la Komitato por reformo de la ĉina skribo aprobis tridekliteran alfabeton, kies fundamenton kreas la latina skribo kun ĉiuj leteroj de la angla alfabeto krom la litero „v“, sed kun aldono de 5 aliaj literoj. Tiu ĉi alfabeto estas fonetika.

Meksiko: la meksika grafikista kolektivo eniris la epokon de la kreanta naturelo kaj akiris internacian rekonon. Ilia laboro ludis grandan rolon por vekti la nacian konscion de la grafikistoj en la cetera Latinameriko kaj ni en MEM deziras al tiu talenta kolektivo novajn sukcesojn en ĝia laboro, ĉar ni estas konsciaj pri tio, ke la rolo de la arto estas fortikigi interrilatojn kaj la amikecon inter la popolojn.

Vietnamo: Ni troviĝas en „Kvartalo de paperlaboristoj“ de urbo Hanoi. En boskoj el bambuoj kaj bananarboj ekvidetiĝas malgrandan kabanon aŭ tute simple malfermitaj budoj, kovritaj per la palmofolioj. De malproksime estas aŭdebla malforta akvoplaŭdo. Ni iras tien kaj trovas grandan tion kun travidebla fluidaĵo – pulpo.

Virino, kiu staras apud la tino, trempas malgrandan retangulan kadron el la solvaĵon, rapide ellevas ĝin kaj elmetas ĝin al la suno. La kadroj staras en vicoj, kaj oni prenas el ili foliojn el mola, silkeca, grizflava papero.

Hejmfarita bambuopapero estas tre malnova metio en Hindaĉinio. Tiu arto herede transiris de generacio al generacio, de patroj al filoj. En Hanoi 260 familioj okupas sin per tia laboro. Multaj el tiuj familioj siatempe iris kune kun la partizanoj en la montaron kaj partoprenis en la rezisto. Gazeto, afiŝoj, flugfolioj kaj libroj estis presataj en la ĝangaloj sur tia hejmfarita papero.

N.Sergejeva

(El „NOVOJE VREMIJA“)

Franco: La franca ĵurnalo de la komunisto partio havas hodiaŭ proksimume 2.800 korespondantojn el kiuj ĉirkaŭ 1.350 estas fabrikaj laboristoj, 200 kamparistoj, 550 oficistoj k.t.p.

REEDUKU MALNOVAJN ESP-ISTOJN!

Legante diversajn organojn de Esperanto, mi sentas iom da danĝero por nia movado en la popol-demokrataj landoj malgraŭ la lastaj brilaj sukcesoj. Tio estas, ke la t.n. eminentaj esperantistoj preskaŭ neniam komprenas socialismon kaj ties verkmanieron, nome socialistan realismon.

Ekzemple P.B. tro longe babilis sur paĝoj de „Esperanto“ de UEA pri la formo de poezio, sed neniam pri ĝia enhavo. Tio devenas, ke ili ne studas la necesajn dokumentojn, ekz. verkojn de Georgo Lukaĉ, kiujn eĉ ni Japanoj studas. Kompreneble, ni povas supozi, ke la redaktoro de E. ignoris tian parton. Sed en tia kazo ili devus forte protesti kontraŭ tio. Cetere iliaj verkoj sufiĉe bone montras mian mension. Iam, mi ne forgesas, mi legis en „Internacia Kulturo“ poemaĉon kun la vortoj „Hozana al Stalin“, tute sensensacan, ankaŭ de eminenta esperantisto el popoldem. lando. Multaj aliaj ne faras escepton.

Se tiu ĉi stato daŭros, mi opinias, ke nia movado renkontiĝos denove kun gravaj malfacilaĵoj. Se ili maldiligentos en studado de socialismo, ili tute kontraŭvole iam povus fariĝi malamikoj de socialismo. Antaŭ ĉio ili devas forviŝi el siaj koroj la etburĝecon. Sen la teorio de Marks kaj Lenin la Esp-movado en popoldemokrataj landoj iam bankrotiĝos.

Nun mi proponas al la estraroj de la Esp-movado en popoldemokr. landoj, organizi reedukajn kursojn por malnovaj esperantistoj kaj forĝi el ili la por ni necesajn esperantistojn. Plie mi proponas rekontroli la tutan enhavon de la malnovaj Esp-eldonaĵoj, ĉar multaj jam ne konformas al la progresinta nuntempo. Kompreneble la estraro antaŭ ĉio devas sin mem eduki, ĉar tro ofte mi vidis lastatempe, ke niaj eminentuloj ornamas sensencajn Esp-gazetojn per siaj verkoj. Esti utiligita kaj ne utiliganta! Kompreneble mi konscias, ke mia propono elvokos grandan malkontenton, sed mi volas eviti, reveni sur la vojon, kiu gvidis al pereado de nia movado en Sovjetio.

MIJAMOTO Masao - OSAKA

LA FESTIVALO DE JUNULARO EN MOSKVO-1957

La Tutmonda Federacio de Demokrata Junularo en Budapeŝto ricevis de la moskvaj organizantoj de la Festivalo-1957 programplanon, en kiu jam estas registrita tendaro de esperantista junularo de la kadro de tiu ĉi festivalo.

Tio signifas, ke nia junularo devas jam de nun aktive eklabori por ke ĝi sukcesu venigi al Moskvo kiel eble plejmultajn junajn esperantistojn.

Unuavice necesas, ke niaj ge-junuloj fariĝu membroj de sialandaj naciaj junular-organizoj kaj aktive en ties grupoj eklaboru. Kontaktigu vialokajn grupojn kun eksterlandaj por interŝanĝi spertojn, materialojn, fotojn k.t.p. Prezentu en la kunvenoj interesajn raportojn, kiujn vi ricevas de viaj eksterlandaj amikoj kaj faru ĉion por vekti la intereson pri nia lingvo en tiuj organizoj. Poste vi facile sukcesos aranĝi tie kursojn kaj eduki junularon, kiu scipovos paroli Esp-lingve en la moskva festivalo. Sed ne forgesu antaŭ ĉio eduki vian propran junularon laŭ la tendencoj de la festival-programo kaj celoj, se vi deziras, ke tiu sukceso eklaboru en la vicoj de la neesperantista junularo.

Nia junularo renkonten iru al la festivalo en Moskvo kun la devizo „PER ESPERANTO POR LA MONDPACO KAJ INKTERKOMPREENIĜO DE LA TUTMONDA JUNULARO!“ Tiam en 1957 amasa partopreno de esperantista gejunularo nepre devas vekti la atenton de la tutmonda junularo kaj gestudentoj, por ke la postvenonta festivalo jam akceptu kiel ĉefan lingvon por sia agado

E s p e r a n t o n ! ! !

Pál BALÁNYI
Budapeŝto.

KONTENTIGAJ REZULTOJ EN LATVIO

Inter akademianoj de Riga mi trovis profesoron-lingviston, kiu favoras Esperanton kaj ĉiam dum siaj lecionoj atentigas la gestudentojn pri la valoro de tiu heplingvo. Dank` al li en la Pedagogia Instituto de Riga jam funkcias grupo da lernantoj sub gvido de energia studento k-do. Mozerts Lia adreso estas: E.MOZERTS, Padomjn bulv.4-6, RIGA, Latvia S.S.R.

El la urbo Liepāja prof. Loja informis min, ke tie fordiĝis grupo de Esp-lernantoj. Ĝia adreso: Prof. I.LOJA, Baseina iela 9, Liepāja Latvia S.S.S.R. Certe multe instigus la lernantojn, se ili ricevus je ambaŭ adresoj multajn salutleterojn.

La multprosperan agadon de nia movado malhelpis unue la okupado de nia lando flanke de Rusoj kaj poste la germaj naziistoj. Dum tiu ĉi trista tempo multaj esperantistoj pereis kaj malaperis, sed malgraŭ ĉio kelkaj restis, kiuj nun kun multobligita energio penas rebonigi la kaŭzitan domaĝon.

La tramistan Esp-grupon ni ankoraŭ ne sukcesis oficialigi kaŭzo de tio, ke en januaro ŝanĝiĝis la estraro de nia faka organizo kaj klubo. De Esp-tramistoj el Zagreb (Jugoslavio) ni ricevis kolektivian leteron por niaj ge-doj. Ĝia respondos niaj funkciuloj. Tiu fakto devigis ilin ekkoni nian lingvon kaj la eblecojn, kiujn ĝi povas doni al la laboristaro.

La printempo, en la naturo malfavora, ankaŭ influas la socian vivon. La ĝermado progresas iomete malrapide, sed ni tamen estas kontentaj kun la ĝisnunaj rezultoj.

Teodors ARBERGS

R I G A

HUNGARAJ ESP-ISTOJ EN AKTIVECO

En la lasta kunveno de Hungara Esperantista Konsilantaro (HLEK) oni raportis, ke jam funkcias 12 fakrondoj kaj samnombraj kursoj malfermigis. Ĵus fondiĝis fakrondo en la kulturdomo de Battonya kaj pluaj estas en preparo. Ekfunkciis ekzamena komitato. Organizigaŝ enlanda gazetservo. Ĉiam pli da provincaj gazetoj aperigas raportojn pri Esperanto. La hungara radio menciis pri la okaziĝonta Universala Kongreso en Kopenhago.

La Tutmonda Federacio de Demokr. Junularo en Budapest daŭre serioze okupiĝas per Esperanto kaj preparas laŭ plano de la Preprakomitato en Moskvo la Esperanto-tendaron por la Festivalo -1957. Ĝia plurlingva revuo publikigis la unuajn koresponddezirojn per Esp-lingvo. Necesas pliaj alskriboj rilate la festivalon kaj junulartemojn.

(Adreso: Federacio de Demokrata Junularo, Benzur ut.34, BUDAPEST-6 Hungario)

La Esp-rondo „PACO“ de la 18a Kulturdomo en Budapest aranĝis la 11. de marto literaturan matineon. Dum ĝi ree aŭdiĝis la voĉoj de J. Baghy, K. Kalocsay kaj kantisto M. Sárossy. Partoprenis proks. 90 gek-doj el diversaj kvartaloj de nia ĉefurbo. La sekretario de HLEK hungarlingve parolis pri la lastatempa disvastiĝo, uzado kaj utiligo de Esp-o kaj prezentis entusiasmigajn ekzemplojn.

La 5. distrikta urbkonsilantaro komune kun la „PACO“-Esp-rondo de la Engels-placa Kulturhejmo aranĝis la 14/III. bonsukcesan Mozart-vesperon. Prelegis k-do. S. Kennesey pri Mozart. Ludis mondfama hungara piano-virtuozo Kossuth-premiita muzikartisto Imre Ungir, malnova blinda esperantisto kaj la violonkvarteto de nia k-do. Jozefo Biro. Krom tio kontribuis hungarlingve membroj de la budapesta operdomo. Partoprenis pres. 200 personoj. La rondo aranĝas ĉiuĵaŭde prelegvesperojn. La 1/3. J. Baghy prezentis tradukojn el verkoj de Heinrich HEINE.

La 8/3. okaze de Hung.-Sov. Amikecmonato, li raportis pri la nova sovjeta literaturo. La 15/3. oni memoris la hung. liberecbatalon en 1848 kaj k-do. Khek rakontis, kiel li utiligis Esperanton dum siaj lasttempaj vojaĝoj (fakaj) tra Bulgario, Jugoslavio kaj Ĉinio. Pri tio aperis raporto en la uzina revuo de granda telefonfabriko en Budapest.

La 13. de majo ni aranĝos en la 20a distrikta kulturhejmo de Budapest tuttagan regionan Esp-renkontiĝon kun impona ekspozicio. Okaze de tio, mi petas alsendon de salutleteroj kaj ekspozicia materialo. Ĝin ni uzos por konstrui efikan „Migrantan Ekspozicion“, kiu grave kontribuos al reaktiviĝo de la hungara Esperanto-movado. Ĉion sendu al: ESPERANTO-RONDO, Vasas Kulturot -Thon, Nagy György, Istvan utca 2, BUDAPEST-XX. Pesterzsábat, Hungario.

Pál BALKÁNYI-Budapest

TUTŜTATA KONFERENCO DE ESPERANTISTAJ PACDEFENDANTOJ EN ĈEĤOSLOVAKIO

Por informi niajn gek-dojn kaj kontantigi ilian senpaciencon, ni povas doni nur sekvantan raporton:

Ni unue proponis al la Esp-klubo en Praha, ke tiu aranĝu nian 2an TUTŜTATAN en 1956 en la ĉefurbo.

La ĉeĥosl. Tutŝtata Konsulta Komitato kune kun la klubo en Praha al ni rekomendis unuigi la Tutŝtatan Konferencon kun de ili projektita Konferenco de esp-istoj el la apuddanubaj landoj, kies titolo ŝanĝiĝis je „Konferenco de esperantistoj el popoldem.landoj“.

Ĉar la aranĝantoj (TKKE) ĝis nun ne ricevis antaŭkonsenton de la oficialaj instancoj, oni transdonis la tutan aferon al la Asocio de Esperantistoj en Pollando, kiu laŭdire havis pli bonajn ŝancojn. Tiun ĉi informon ni ĉerpis el la „BULTENO“ de la Esp-klubo en Praha.

La 18.de aprilo ni ricevis la oficialan organon de la Asocio de Esperantistoj en Pollando, „BULTENO“ n-o.2-3 kaj en ĝi ankoraŭ ni legas nenion pri la aranĝo de tiu konferenco. Estas nekomprenebla, kial nun ĉiuflanke regas silento. Estas laŭ tiu ĉi situacio tre duba, ĉu ankoraŭ tia konferenco en tiu ĉi jaro efektiviĝos.

Sekve de tio ni estas devegetitaj rezigni aranĝi la II.Tutŝtatan konferencon de Esp-pacdefendantoj dum tiu ĉi jaro. El tiu ĉi lekcio necesas ankaŭ preni instruon, ke ne ĉiam konvenas fari aliancon. Per la ventona jaro 1957 ni esp-pacdefendantoj preparos nian konferencon tute sendepende kaj memstare kaj se eble komune kun Internacia Renkontiĝo de „Mondpaca Esperantista Movado“.

Niaj gek-doĵ estas petataj jam de nun sendi la eblecojn, en kiu loko plej bone konvenus la konferencon sukcesplene aranĝi kaj kontakti pri tio kun nia redakcio.

R.Burda

POR VIA DISTRO

Gazetoj antaŭ nelonge raportis, ke en malgranda montvilaĝo de Georgio ankoraŭ vivas soldato, kiu batalis kontraŭ Napoleono dum la milito kontraŭ Ruslando komence de la antaŭa jarcento. Lia nomo estas Jegor Korosev kaj li havas 154 jarojn. Li loĝas kun sia edzino, eta bubino nun 115 jarojn aĝa.

SPIRITA Batalo

Ĉu vi legis, ke en iu biblioteko „ano de malvarma milito“ batis *kontraŭulon* sur la kapon per la libro de Berta v.Suttner „For la batalilojn!“?

Nu, tio ja montras, ke ankaŭ popolamikoj povas batali per spiritaj armiloj.

Pri kio la reakcia gazetaro skribus, se ekregus vera maltensio en la mondo?

Ju pli oni okupas sin pri la latina lingvo, des pli bone oni komprenas, kial la imperio de la Romanoj pereis.

(Lord Derby)

PRI VIETNAMA LITERATURO

En Vietnamo troviĝas ankoraŭ malmulte de libroj. Sed la ministerio por publika instruado eldonis dum 6 monatoj en 1955 diversajn lernolibrojn en suma eldokvanto de unu miliono. De aliaj libroj aperis en la sama tempo ĉ.4 milionoj da ekzempleroj. La verkoj de Ho Chi Minh eldoniĝis sepfoje. En Hanoi aperis tri taggazetoj kaj 12 semajnevuoĵ. La ĵurnalo „Nhan Dan“ (La Popolo), organo de Lao Long-partio (Partio de l' laboro) havas nun eldonkvanton de 40.000 ekzempleroj.

PREZIDANTO TON DUC THANG

Sub tiu ĉi titolo eldoni la MEM-sekcio-rondeto en Hanoi Vietnamo (interesan faldprospekton kun la portreto de la prezidanto Ton Duc Thang kaj priskribo de lia batalplena vivo. La prospekto estas en Esperanto – kaj en vietnama lingvo. Malmultaj gek-doj konas la vivon de tiu granda homo, kiu en la jaro 1955 ankaŭ ricevis la pac-premion en Moskvo.

Certe nia reprezentanto de MEM k-do.N.V.KINH, N-o.2 Ly – túəng-Kiět, HANOI, en Vietnamo volonte al vi liveros ĉi prospekton, kiu estas efika propagandilo en la Popoldemokratioj, kontraŭ alsendo ajn alia propaganda materialo el via lando.

La red.

LETERO DE MAKSIM GORKIJ AL ESPERANTISTOJ EN MINSK

Aŭtune de la **1927**.jaro, je 35-jara datreveno de literatura agado de fama sovjeta verkisto M.Gorkij, minskaj esperantistoj lin elektis kiel sian honoran membron. Pro tio ili skribis al M.Gorkij leteron kaj sendis al li ankaŭ membrokarton. M.Gorkij repondis per sekvanta letero:

„Estimataj kamaradoj!

La deziro, krei lingvon komunan por ĉiuj homoj estis unu el tiuj arogantaj ĝis frenezo aspiroj, kiuj ĉiam servis, nun servas kaj ĉiam servos al la apero de organizado de l' mondo laŭ la volo de la homo kaj por senlima evoluado de homaj kapabloj.

Estas ne diskutebla, ke parolante per unu lingvo, la laborula homaro multe pli rapide estus kompreninta la unuecon de niaj interesoj.

Kontraŭ esperanto oni argumentas: Ĝi estas artefarita lingvo kaj la lingvojn oni ne kreas arte, mi ne scias kiel oni kreis la lingvojn tiam, kiam homo eksentis la neceson paroli vorte; teorioj pri deveno de la parolo ne ŝajnas al mi esti kontentige klarigantaj tiun ĉi procedon. Al mi ŝajnas, ke ni, la homoj, havas la rajton diri: Ĉio, kion nomus „Kulturo“, la tuta „dua naturo“, kiu estas kreata de nia scienco, tekniko, arto, - per unu vorto, ĉio, kio forkondukas (diferenciga) nin de bestoj – ĉi estas „artefarita“. Te-kulero estas objekto artefarita samkiel tranĉilo, botoj, ĉaro, boato, vaporŝipo, aŭtomobilo, libro, muziko, bildo.

Al nomo – je kiom li estas besto – estas nature sorbi aŭ trinki per plenmano, esti nuda, murmuregi sed estas tute nenature elpensadi Prometeon, Faŭston, Don Kiĥoton.

Ni vivas en domoj, urboj, inter objektoj, faritaj per la forto de nia racio kaj imago, per nia volo por ke nia vivo estu por ni pli facila kaj agrabla. Se la homoj ekkonscias la neceson, ke ĉiuj parolu en unu lingvo – tio ankaŭ estos plenumita (plenumiĝos). Ĉio sur la tero estas kreata per streĉo de nia volo, de nia fantazio, de nia racio. Estas necese, ke la homo sugestu al si mem „mi ĉion povas“. Ne necesas timi arogojn kaj frenezojn en la aferoj de laboro kaj kreado. La plej granda kaj mirinda el ĉio farite de homoj estas – scienco, arto, tekniko. La unua, la dua kaj la tria estas absolute frenezaj.

Ĉi supran leteron havigis al nia redakcio k-do.P.M.KIRJUŜIN
el MINSK-Sov.Unio

LA „PACDEFENDANTO“ HELPIS

De la Ligo de Ĉeĥoslov.Invalidoj Blindula presejo kaj biblioteko, PRAHA-II, Krakovská 21, ni ricevis jenan leteron

„...ni revenas al via letero de 7.dec.pasintjare, por danki al vi por la publikigita artikolo rilate nian Esp-lingvan publikaĵon „AŬRORO“. Tiu ĉi publikigo en via organo „La Pacdefendanto“ renkontiĝis kun eksterordinara sukceso. Ĝi ligis nin kun kelkaj novaj amikoj precipe el Sovjetio kaj popoldem.landoj.

En tiuj tagoj nin *ĝojigis*, ke ni legis alvokon ankaŭ en la Itala eldono de „PACO“ Ni certe ĝuste difinas konstatante vian kontribuon kaj tiel ni dankas por tiu ĉi kunlaboro.

Kun saluto „Sukceson al paco“

Vuk ECHTNER

Ferd.Vildmann
direktoro

videntiĝas, ke anoncoj en nia organo ĉiam alportas sukceson.

MI DEZIRAS ESTI MEMORO DE „MEM“

Kun ĝojo mi tralegis la artikolon „Vidu l' animon de sovjeta homo“. Legante la leteron de Arvedo Větra mi ploris, ĉar ankaŭ mia familio travivis multajn suferojn dum la milito. Dum la milito

germanaj faŝistoj mortigis miajn parencojn kaj bruligis la Esp-bibliotekon. La plej forta deziro de nia popolo estas la Paco. Mi lernis Esp-on en 1921 kaj 10 jaroj mi gvidis Esp-grupon de urbo Ruza apud Moskvo. Nun mi loĝas en Galiĉ apud urbo Kostroma. Post la milito mi longe klopodis trovi esp-istojn kaj nur en **1953**, kiam mia adreso estis publikigita, mi ricevis preskaŭ 1.000 leterojn el 30 landoj

21—

Tiujn leterojn mi uzis en nia urba klubo por ekspozicio kiu al mi helpis organizi esperantistan klubon. Ĉar mi ĝis nun ne sukcesis trovi klubejon, ni kunvenas en mia hejmo. Mi sendis al nia ministro por kulturo kaj al la centra komitato de komunista partio leteron pri uzado de Esperanto por defendi pacon kaj proponis fondon de Sovjetunia Esperantista Unio. Ankaŭ mi sendis leterojn al la partia kongreso kaj al la Asocio por kulturaj rilatoj kuneksterlando, por ricevi permeson por la laboro de Esp-grupoj. Ĉie nun mi ne ricevis respondon, tial nia grupo laboras en mia hejmo.

Poresperanta laboro ĉe ni ne estas facila, ĉar dum 20 jaroj niaj gazetoj silentis pri Esperanto kaj multaj homoj opinias, ke ĝi ne plu ekzistas. Sed ni, sovjetaj esperantistoj ne timas malfacilejon. Ni volas labori per Esperanto por paco, amikeco kaj socialismo. Ni estas feliĉa, ke mi regule ricevas „Pacdefendanton“, „Pacon“ kaj aliaj gazetojn. Por „La Pacdefendanto“ mi donacas 50 rublojn, kiujn mi tuj sendos kiam vi konsilos kiamaniere tion fari. Mi deziras esti membro de M.F.M., sendigu al mi membrokarton!

En mia loĝejo mi aranĝis ekspozicion de eksterlandaj leteroj kiun ankaŭ vizitis sekretario de urba komitato de komunista junularo. Li kun intereso rigardis ĝin kaj promesis helpi al nia afero.

Somere 1957 estos en Moskvo la 6. Internacia Junulara Festivalo. Tiukaze nia Esp-grupo deziras korespondi kun gejunuloj, kiuj intencas kaj povos viziti ĝin. Ni ankaŭ invitas eksterlandajn amikojn viziti nian urbon Galiĉ-Kostromskoj kaj volas ilin akcepti kiel gastoj de nia grupo. Plue nia grupo preparas aranĝon de granda ekspozicio por varbi interesulojn al nia movado (en somero). Gek-doĵ, kiuj sendos al ni tiurilatan materialon, ricevos rekompence de ni belan ilustr.gazeton, poŝkartojn, poŝtmarkojn aŭ aliajn objektojn laŭ deziro. Ĉion sendu al:

ESPERANTO-GRUPO, Petro SPODOBIN, GALIĈ-Kostromskoj, Sovjet-Unio.

BONVENON AL NOVAJ KUNBATALANTOJ!

Leginte nian alvokon en la lastaj numeroj de nia organo, aliĝis k-do.P. Williams el Nova Zelando por akcepti la funkcion de „MEM“-peranto en tiu malproksima lando.

K-do.P. Williams estas fervora esp-isto kaj jam antaŭ longe enviciĝis en la batalon kontraŭ la A-kaj H-bomboj kaj ĉiu milito. Li estas loka reprezentanto de la Nov-Zelanda Packonsilantaro, sekretario de Timaru-fako de Mond-federalistoj kaj loka reprezentanto de Nov Zelanda Esperanto Asocio. Ni tutkore bonvenigas la novan peranton en la konvinko, ke ankaŭ li klopodos kun ĉiuj fortoj disvastigi nian noblan ideon en la por ni Eŭropanoj malproksima Nov-Zelando. Lia adreso estas: P. WILLIAMS, Trafalgar St.26, TIMARU, Nov-Zelando.

EL BULGARIO

La Bulgara Esp-Asocio kaj Bulgara Esp-Kooperativo komune eldonadas organon kun titolo „BULTENO“. Ĝi estas eldonata ĉiumonte po 10-14 paĝoj, stencilita kun bone legebla kaj vere interesa enhavo. Precipe inter la bulgaraj esp-istoj tiu gazeto ludas gravan rolon kiel bonega propagandilo, organizilo kaj interligilo, sed krom tio ĝi estas valora komunikilo ankaŭ por alilandaj esp-istoj, kiuj interesas havi informojn pri la evoluo de nia komuna afero en Bulgario. Ĝia adreso estas: SOFIA-poŝtkesto 66.

EL FINLANDO

Meze de junio tiujare okaziĝos en Helsinki Internacia Renkontiĝo de Ĵurnalistoj. Eksterlandaj kolegoj, kiuj volas korespondi kun la organiza komitato rilate la Renkontiĝon, ekskursojn ktp., sin turnu al jena adreso:

Allmänna Journalistförbundet, HELSINKI, Finnlando. Oni kores.Esp-e.

ADRESSANĜO:

Nia peranto por Danlando loĝas nun jene: Willy NIELSEN, Saxesgade 23, Aakirkeby, BORNHOLMO, Danlando. PACO-eldonanto notu tion!

NIA LETERKESTO

Bona Propono: Mi legis en „Pacaktivulo“ proponon de k-do. Kvist, kiu laŭ mia opinio ne restu sur papera, sed estu efektiva per aĝo. La propono temis pri vendado de unuopaj numeroj de „PACO“ al esp-istoj, kiuj *ial* ne volas aboni. Malnova sperto pri gazetvendado instruas min, ke estas eble vendi ankaŭ ne malmultajn ekzemplarojn de „PACO“ en Esperanto kunvenoj, se nur aktivaj vendistoj prenis sur sin tiun ĉi taskon.

L.

Rim.de red.: Sed en Ĉeĥoslovakio tio ne eblas, ĉar ni eĉ ne sukcesas ricevi la necesan kvanton de „PACO“oj de MEM por la regulaj abonantoj, kiuj jam abonpagis ĝin.

ĈU „MEM“ ESTAS UNUTENDENCA?

Diskutante kun mia korespondanto pri „MEM“, tiu opinias, ke „MEM“ estas unutendeca organizaĵo. Ĉu li pravus?

Demandulo

--- MEM estas unutendeca tiurilate, ke ĝi per sia organo „PACO“ ekskluzive laboras por paco kaj internacia maltensio. Ĉi do estas same unutendeca (sen ceteraj komparoj) kiel ekz. la mondfederacioj en la Universala Ligo kun sia organo „La Praktiko“.

Sed MEM ne estas unutendeca en tiu senco, ke ĝi estus partipolitike engaĝita. Male, ĝia statuto i.a. tekstas: „la anoj evitu, ke MEM falu sub disciplinon de politika partio“. Kaj PACO publikigas artikolojn pri pacmovado de kie ajn.

MEM ne estas unutendeca en tiu senco, ke ĝi estus neŭtrala rilate pacon kaj militon, rilate progreson kaj reakcion. Male, senideeco, senprincipeco, falsa neŭtraleco rilate al aktualaj komunhomaj demandoj, estas por MEM negativaj kaj malutilaj elementoj.

Ni bone scias, ke unutendecaj homoj, kiuj nur legas gazetojn kiuj atakas la mondpacan movadon imagas, ke la pacmovado estas komunista movado kaj ke ankaŭ MEM estas tia. Sed, ĉu do nur komunistoj havas intereson por la paco? Ĉu amasmortigoj en ev. venonta milito trafos nur komunistojn? Kompreneble ne. Tial troviĝas kiel en la Mondpaca movado, tiel en MEM diversaj politikaj, filozofiaj kaj religiaj konceptoj kunigitaj per la vojo al paco kaj amika kunekzistado.

Ni esperas, ke esperantistoj ekster la vico de MEM, ne plu falu en komikan konfuziĝon, cerbumante pri la ĝusta tendenco de MEM kaj PACO.

La centra redaktoro

PURA LINGVO

Mi scias, ke la eblecoj de la centra red. estas limigitaj. Sed li almenaŭ postulu de la landaj redaktantoj de PACO, ke ĉiu trovu en sia lando spertan esperantiston, kies tasko estus revizii laŭ lingva vidpunkto ĉion, kio estas presota. Tion faras ankaŭ la plej spertaj verkistoj, do pli tion devus fari niaj nesufiĉekapablaj redaktoroj landaj. Se poste en nia gazeto restos nur presararoj (kiuj ĉiam estis en malplimulte kompare kun gramatikaj eraroj), tiam ni povos ĉie fere montri ĝin.

A.Zmeškal – Praha

___ La centr.red. konsentas kun k-do.Zmeškal. Ĝusta kritiko estas pli utila ol flato. Tial la propono de Z. estu observata. Certe ĉiuj revas pri lingve korekta gazeto. Pli da atento rilate la lingvan nivelon signifas, ke hodiaŭa revo povos fariĝi morgaŭ realaĵo.

La centra redaktoro

AL PLENDU DE MULTAJ SOVJETAJ

GEKAMARADOJ: ke ili ne ricevas sufiĉan kvanton de nia organo, ni povas diri, ke la centra sekr. jam plialtigis la ĝis nun senditan kvanton kaj krom tio ni esperas, ke ankoraŭ niaj diverslandaj eldonantoj laŭ ilia ebleco ne forgesos aldoni kromnumerojn por la ĉefperanto de Sovjetunio, k-do. Toll en Leningrado.

.....

PADOMJU SKOLOTAĴS

grava sovjetunia gazeto de la Pedagogia Instituto en Riga (Latv.) publikis ampleksan artikolon pri la valoro de Esperanto kaj ĝia grava rolo en la internacia pacmovado en sia eldono de 21.marto. La artikolon verkis nia fervora k-do.studento E.Mozerts el Riga.

EL ESTONIA S.S.R.

La restariĝo de MEM bone progresas.

ADRESOJ DE MEM-SEKRETARIEJO

Sekretario: K-do. A.BALAGUE, Kirchenweg No.12, ST. POLTEN, AŬSTRIO.
Helpsekret.: K-do. Karl KVIST, Box 109 A, DEJE, Svedio.
Centra redakcio: K-do. G.HOLMKVIST, Rönneholmsvägen 55, tr.2, MALMÖ-V, Svedio

AL LA REDAKCIOJ DE ESP-GAZETOJ

Ni volonte interŝanĝos nian organon „PACO“ kun la via. Bonvolu sendi ĝin al k-do. Karl KVIST, Box 109 A, DEJE, Svedio.

MANUSKRIPTOJ, RAPORTOJ, ANONCOJ

devas atingi la centr. redakcion lastdate la 1-an de ĉiu monato por povi aperi en venontmonata nia eldono. Preferataj estas artikoloj, kiuj ankoraŭ ne aperis en aliaj Esp-gazetoj. Ĉion sendu al: Centra red.Gösta HOLMKVIST, Rönneholmsvägen 55, tr.2, MALMÖ-V, Svedio.

LIBRO-RECENZO

Nia organo „PACO“ mencias ĉiun libron kaj broŝuron, de kiu ni ricevas po unu ekz. Pri duekzempl. ricevo ni faras krom tio recenzon. Sendu ĉion al:
D-ro.Adolf HALBEDL, Schmittgasse No.15, KNITTELFELD, AŬstrio.

PASIGU VIAN FERION EN INTERNACIA ESPERANTISTA KULTURDOMO

La sukceso de ESPERANTO ĉe UNESCO estas ligita al la internaciaj kulturaj interŝanĝoj pere de nia lingvo. Por tiu celo funkcias en la bela Loir-regiono de Francio Kooperativa Esperantista Kulturdomo, kie samideanoj el ĉiuj landoj povas ĝui sian libertempon, praktiki la lingvon kaj studi diversajn problemojn. La somera programo por 1956 jam aperis kaj estas mendebila ĉe: ESPERANTISTA KULTURDOMO, GRÉSILLON BAUGÉ (Maine-et-Loire), Francio.

GRAVA HISTORIA DOKUMENTO

estas la jarkolekto de „LA PACDEFENDANTO“-1955. En ĝi respuguliĝas vere historie gravaj okazintaĵoj de nia movado en la popoldemokrataj landoj kaj Sovjet-Unio. La volumo ampleksas 104 paĝojn (kompleta jarkolekto). Ricevebla kontraŭ paĝo de 12.-Kĉs aŭ 16 internac.resp.kup. ĉe k-do. R.BURDA, Palackého nám.č.6, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio.

KORESPONDI DEZIRAS :

K-do. Josef HOŘEJŠÍ, D.Z. ZVIL, Ĉechova ul., PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, bezonas medikamenton kontraŭ alta sangpremo „SERPASIL“. Ĉiuj elspezojn li volonte rekompencos per alsendo de ia folkloro objekto laŭ via deziro kaj interkonsento.

K-do. Imre VÁGO, instruisto, Rudas L.u.21, PÉCS, Hungario. Oni ne permesis instrui Esp-on en nia lernejo. Tial mi volas konvinki ilin per aranĝo de impona ekspozicio de infandeseĝnoj kaj petraĵoj de 6-14agaj infanoj el ĉiuj landoj. Bonvolu helpi per materialo.

K-do. Hristo TONEV, Str.P.Volov 32, KOLAROVGRAD, Bulgario, por multaj kursanoj serĉas gekorespondantojn el ĉiuj landoj pri ĉ.temoj.

K-do. LIU Zyn, Private Box No.100, Room 24, 3rd Tog, Tsien Tsin Li, Southern 13 Ma Lu, Tiehsi Chü, MUKDEN, Ĉinio (jen mia nova adreso)

K-do. Tonko T.TONKOV, Bankja, Sofijsko, str.Trokija 2, Bulgario (stud.matematiko) pri naturhist. temoj. Interŝ.insektojn kaj plantsemojn kun malproksimaj landoj k.a.temoj.

REGIONA ESP-KUNVENO ĉe Bálint Balassi Kulturdomo, BÉKÉSZÁBA, Hungar.okaziĝos la 2an de junio. Bonvolu sendi salutleterojn kaj prop.mat

K-do. István TEMESI, MÁVtelep 26/4, MISKOLC, Hungario, por fervojista Esp-grupo, kiu en majo okaziĝos Letervesperon ni petas korespondaĵojn. ESPERANTO-GRUPO, Petro SPODOBIN, GALIĈ KOSTROMSKOJ, Sovjet-Unio, 10 gejunuloj de 15-18 jaroj kun komunista junularo de ĉiuj landoj.

Sovjetia tajlorino koresp. kaj interŝanĝas modo-revuojn (fasonoj, modeloj de vestaĵoj) kun ĉiuj landoj. Skribu al: Esp-Grupo, Petro SPODOBIN, GALIĈ KOSTROMSKOJ, Sovjet-Unio.

K-do. Petro SPODOBIN, Esperantogrupo ricevis en 1955j. preskaŭ milon da leteroj el 30 landoj. Ili helpis al mi aranĝis ekspozicion kaj fondi E-grupon. Pardonu min, ke mi ne povis al ĉiu skribinto respondi. En 1956 mi estos pli libera kaj penos fari tion kvankam malfrue. Mi dez. koresp. kun instruistoj, kuracistoj, agrikulturistoj kaj amikoj, kiuj povos viziti Sovjetion. Ilin mi invitas kiel person.gastojn al mia hejmo. Tiaj vizitoj multe helpas al nia propaca esperantista movado en nia lando.

(Daŭrigo sur paĝo n-o.24a)

24-

K O R E S P O N D I D E Z I R A S

Esp-grupo,School House, Taunton School, TAUNTON, Somerset, Anglio, 16-17jaraj esp-istoj volas korespondi kaj interŝ.p.k.il.kaj p.m. kun samaĝuloj.

K-do.Mihail V.BATANOV (59jara), Str.199,No.32 TOLBUCHIN, Bulgar. Kun ĉ.landoj pri ĉiuj temoj. Interŝanĝas ilustraĵojn.

JUNULARA SOCIETO „JUNECO“ serĉas korespondantojn por siaj 16-18 jaraj membroj. Adreso: Borisl.A.VELEV, Str.Stalin 5, GOCE DELĈEV, Bulgario. Ĉiu ricevos resp.

K-do. Lubomír LUKI (24j.ofic.), Česká Ves 273, okr. Jeseník Ĉeĥoslovakio, kun ĉ.landoj.

K-dino.Lea BOČKOVÁ, Kamenná, BRNO, Ĉeĥoslovakio, kun instruistoj, profesoroj kaj kuracistoj
Adresŝanĝo: J.B.KOTEK fariĝis soldato. Lia nova adreso estas:Žižkovec J.B.KOTEK, PS 38/P-6, BRATISLAVA, poŝt.sch.2017, ĈSR.

K-do. Chu Yung-Shing, 542 Kung Ho Hsin Road, SHANGHAI, Ĉinio, kun la tuta mondo kaj interŝ. librojn, gazetojn kaj il.p.k.

K-dino PERRIER (f-ino) Place St.Martin, UPIB (Drome) Francio, per leteroj kaj il.p.k.

20 LERNANTOJ 12-14jaraj de metia desegn-lernejo dez.kor. kaj interŝ.il.p.k.kaj p.m. Skribu al instruisto Silvano MANIAS, AZZANO DECIMO (Udine), Italio.

K-dino.Zdenka KNEJEVIĈ, Trsatska str.22, ZAGREB-IV, Jugoslavio, kun ĉ.landoj pri divers.temoj

K-do. Alfons LABISCH, Ul.Strzelców 2, GROSZOWICE, pow.Opole, Polio kun ĉ.landoj per il.p.k.

K-do. L.POHL, Str.Garii 6, BALA MARE, Rumanio, kun gek-doj de 20-30j

Malnova k-do.kiu de post jaroj ne ricevis Esp-aĵojn, petas ĉiu specajn Esp-aĵojn, precipe gaz., revuojn, librojn ktp., kiujn li bezonas por esperantologiaj studoj kaj kompilo de bibliografio. Adreso: Julio OSAPO, Str.Kinizsi No.66, SATU MARE, Rumanio.

K-do. Jb. Van LEEUWEN, Watermolenstraat 15, WESTZAAN, Nederlando kun ĉiuj landoj. Certe resp..

K-do. Valentin OVĈAROV, U.Sterü *VodeniMarov* No.17, *BOURGAS*, Bulgar. kun ĉ.landoj per il.p. k.interŝ.il.sportgazetojn kaj p.m.

K-dino Maria Aleksandroba GEORGIEVA, Str.Kiril kaj *Metodo* No.164, Sofia, Bulgario, per let. kaj p.k. Interŝ.il.gaz., fotojn ktp.

K-dino Věra BARTOŇOVÁ, Sv.Čecha ĉp. 1271, TURNOV-II, Ĉeĥoslovakio, kun ĉ.landoj pri ĉ. temoj kaj interŝanĝi il.p.k.

K-do. O. MAREK, ŽAMBERK č.797, Ĉeĥoslovakio, kun natursciencistoj por interŝ. skarabojn el ĉiuj mondpartoj.

K-dino Svatava FAGOŠOVÁ (26j. akuŝistino), Přemyslovců č.13, OSTRAVA-III, Ĉeĥoslovakio, kun ĉ.landoj.

K-dino Božena KLAPCOVÁ (20jara oficistino) LUDGEŘOVICE-Vrablovec 418, okres Hlučín, Ĉeĥoslovakio, kun ĉ.l.

K-dino R.MAREŠOVÁ (instruistino), ŽAMBERK č.642, Ĉeĥoslovakio, kun ĉ.landoj pri muziko, per il.p.k.

K-dino J.BELTMAN-RULSHOF, Kruisstr.40 A, ZUTPHEN, Nederlando, kun ĉ.l.

K-do. Herman LIEBELT, Magdelstr. 91, JENA, Germanio-D.D.R. pri ĉ.temoj kun ĉiuj landoj.

K-dino Violeta M. PANĈEVA, Str.Filip Totju 28, SOFIA-10, Bulgario (18jara) per il.p.k. kaj leteroj k. ĉiuj landoj pri sporto.

K-do. Stanislav ŠMÍD, Veleslavínova č. 32, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, kun ĉiuj landoj, interŝ. il.p.k. kaj p.m.

K-do. Vratislav KUĈERA, poŝt.schr.61, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, kun ĉ.land. Interŝ.alumetvinjetojn, il.p.k.p.m.

K-dino Galja VASILJEVA, USSR, MOSKVA VI, ulica Oktjabrskaja Pole d.35/7, kun ĉ. landoj pri div. temoj.

K-do. K.ZWIERS, Middenstraat 37, SLIEDRECHT, Nederlando, interŝanĝas po 100 p.m. (ŝtमितaj aŭ neŝtam.) kun ĉiuj landoj.

K.do. P. M. KURJUŠIN, Krasnaja 16, kv.20, MINSK-5, Sovjet-Unio, serioze, precipe kun scienculoj pri filozofio, logiko kaj psikologio. Interŝanĝas Esp-kaj nacilingvan literaturon. Kun ĉ. landoj.

Pliaj anoncoj troviĝas sur antaŭa paĝo 23a.

Eldonis: OKRESNÍ VÝBOR OBRÁNCŮ MÍRU – odbor esperantistů – M I K U L O V
Redaktis: K-do. Rudolf BURDA, Palackého nám. ĉ.6, PLZEŇ, ĈEĤOSLOVAKIO
